

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



Januaro  
2008

Nº1

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №1 (159)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2008**

*Internacia tarifo:* 32 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 18 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 390 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la paĝo 27.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 750 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №1 (159).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 декабря 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 750 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Mi devas diri “adiaŭ” al tiu libera tono en kiu mi skribis miajn ĉi-tieajn komentojn pri la interna politiko de Ruslando. Ne pro prudenta egoismo, sed por ne krei problemojn al la redaktoro. Certe, la tuta lando ne atingis ankoraŭ la gradon de monolitigo de Ĉeĉenio (99% por la prezidenta partio dum la decembroj elektaj), sed la tendenco sin deklaras senvariante. La ŝtato streĉe laboris kun la ĉeĉenoj por igi ilin tiom dankemaj. Nun oni sentas ĝian zorgan atenton kreski universale — space kaj branĉe kaj atingi la kvaliton de aŭtenta totaleco. La denaska lojalismo de miaj samcivitanoj ne prezentas, cetere, iun realan embarason al la administra gildo. Evidente, en impeto de memidentigo la arketipoj de la nacio ŝtonigas la vojon al projekta futuro. Ni nomu ilin do ontologiaj futuristoj.

— La rusa popolo ne ŝatas jurosciencon kaj ne fetiĉadoras homajn rajtojn — ĝi amas sian elektiton, post kiu ĝi sentas la Dian manon. Nur unu karismulo — patro de la nacio — havas sufiĉan forton por unuigi la homamason en unu socian tuton kapablan al sencigita ago. — Tiel komentas (plenaprobe) la situon la organo del verkista unio, *Literatura Gazeto*.

Tiu tre tipa nun frazo lakoniĝas en la slogano pri *nacia ĉefo-gvidanto*. La futurismo manifestas longajn radikojn kaj deklaras sin komplete tradicia. Temas pri “eterna spirit-ontologia *nacia vertikalo*”, kiu nepre restariĝas post kiaj ajn metamorfozoj. Temas pri *Plano de Putin*. Ekzistas do certa plano, kiun la ĉefo kaŝis ĵaluzo dum la ok jaroj de sia prezidenteco. Nun ekstreme gravas ke la nacio unuigu por doni vivon al tiu projekto. La “Unuigita Ruslando” kun ĉiuj siaj junulaj, maljunulaj kaj de nun jam infanulaj filioj jam sakramentis la Planon. Konforme al la etoso del momento ĝi sekvis la principon de mistereco de la inico. Havis lokon Akto de Kredo. Ĉar la fidela ne rezonas kaj ne hezitas, sed kredas kaj plenumas...

Skribinte ĉi-supron mi ne rompis, laŭespere, la promesitan lojalecon. Simple mi iom citis popularajn sloganojn sen iu atenco al karikaturo. En la ĉi-subo, eble, mi estu pli originala, sed neniom pli malamika al niaj vertikalaj sanktaĵoj.

Inter la ceteraj sanktaj atributoj de nia granda afero oni havas la jenan. Ĉiuj herojoj de karisma naturo realigis siajn heroĵojn en la eskorto de entuziasmuloj kies kredo projektis vertikalon ne el tera, sed el etera substanco. Al tia eskorto ne gravis la administra rango de sia elektito. Kaj la profeta elektito, laŭnorme, ne neglektis konsideri tiuaspektajn kvalitojn de sia eskorto. Ja, kiel oni diras, la reĝon faras la sekvantaro. La sekvantaro de nia karismulo, kiun li adoptis solene kaj publike, havas fluan administran historion. Ĝi ŝanĝis plurfoje kaj krute siajn politikajn principojn, sed neniam ĝi ŝanĝis la etikajn: esti ĉiam plej proksima al tiu, kiu nun plejpotencas.

Eble iom tre marĉeca grundo por la piedestalo de karisma gloro.

*Alen Kris*

Sur la kovrilpaĝo estas vintra foto de Olga Ŝipovalenko (Kaliningrado).



# Mi estas kontraŭ ununura lingvo en Eŭropo

*Babilado kun EU-Komisionano pri multlingvismo*

**Dafydd ab Iago skribas el Bruselo**

En la novembro *Ondo* ni esploris la mankantan subtenon de altrangaj politikistoj de la Eŭropa Unio al Esperanto kaj vidis, ke ankaŭ la nova EU-respondeculo pri multlingvismo, Leonard Orban, estas tre skeptika pri la neŭtrala pontlingvo. Intervjuita de la Brusela korespondanto de *La Ondo*, Orban ripetas la negativajn respondojn ricevitaĵojn de esperantistoj eĉ dum la tempo de nur ses oficialaj lingvoj en 1958. La verda propono restas la sama: enkonduko de la internacia helplingvo por faciligi kaj rapidigi dialogon, en reciproka respekto de la lingvo, de la kulturo, de la digneco de ĉiu eŭropano. Sed je ĉiu pligrandiĝo EU preferis aldoni novajn naciajn lingvojn.

Ĉu tamen estas ebleco por Esperanto en la nova Eŭropo? Aŭ, pli modeste: ĉu troveblas EU-mono por Esperanto-projekto? La komisionano pri multlingvismo Orban povus respondi tiun demandon kaj povus doni direkton al la lingva politiko de la Komisiono. Orban eĉ povus forigi la makulon de *artefariteco*, en “seriozaj” kaj “eŭropaj” medioj pri nia kara lingvo. Ĉu Esperanto rajtas ricevi finanĉan subtenon de EU-programoj same kiel la oficialaj EU-lingvoj? “Teorie jes, sed mi ne povas respondi tiun demandon”, — Orban diris al mi.

Sed detalan kaj lertan respondon donis al mi oficisto en la kabineto de Orban. “Ĉiuj lingvoj de la mondo estas allaseblaj sub la lingva programo de la Tutviva Lernadprogramo. Tamen Esperanto estas tre aparta, kompleksa kaj malfacila kazo. Ni ĝin ne promocias, ĉar komprenado de aliaj kulturoj venas de la lernado de tiuj lingvoj, kiuj donas esprimon de tiuj kulturoj”, — diris la fidata oficisto de Orban, sekvante la oficialan sintenon de la Komisiono laŭ la piednoto de la *Nova Kadrostrategio por Multlingvismo* el la jaro 2005. Bedaŭrinde, tiuj homoj, kaj eĉ ne Orban, direktas la politikon pri la disdono de EU-subtenoj al Esperanto-projekto.

Ĉi-sube *La Ondo de Esperanto* interparolas kun la EU-respondeculo pri lingvaj aferoj, Leonard Orban.

**Ĉu vi pensas ke lingvoj kiel Esperanto povas esti la solvo por Eŭropo?**

Ne. Mi estas kontraŭ komuna lingvo (“lingua franca”). Ni havas tiom da lingvoj. Tio estas nia riĉeco kaj ni devas uzi la lingvojn. Mi ne pensas ke ni bezonas alian lingvon ĉar ni jam havas multajn. Ni jam havas tre riĉajn lingvojn.

Mi jam aŭdis Esperanton plurajn fojojn. Kompreneble, mi ne povas ĝin paroli. Gravus ke ni promocias la lingvojn parolatajn en la Unio. Tio signifas la oficialajn lingvojn, sed ankaŭ la aliajn. Ankoraŭfoje, mi estas kontraŭ komuna lingvo. Ni havas tre riĉajn lingvojn kaj ni devas esti fieraj pri niaj lingvoj. Ni devas lerni lingvojn. Mi ne pensas ke ni bezonas neŭtralan lingvon por pli bone komuniki.

Ni nun havas eŭron — ununuran monon. Sed la intenco de EU tute ne estas ekhavi ununuran lingvon aŭ kulturon. Ni estas fieraj pri nia heredaĵo reprezentita per granda nombro de kulturoj kaj lingvoj. Ni volas ne nur pluteni ĉi tiun riĉecon sed ankaŭ promocii ĝin.

**Post la pligrandiĝo de EU en 2004, la lingvonombro duobliĝis, sed la buĝeto por multlingvismo kreskis nur je 20%. Ĉu tio indikas mankon de apogo al multlingvismo?**

Ni devas esti tre praktikaj, kaj ni plutenas la kostojn je certa nivelo. Pro tio ni tiel insistas pri novaj teknologioj por



Leonard Orban, la respondeculo pri multlingvismo en EU (Foto de Aŭdvida Departamento de EK)

sekurigi la longdaŭran subteneblon de la nuna lingva reĝimo. En la proksima kaj fora estonteco la nombro da lingvoj kreskos ĝis 30 aŭ pli. Ni devas trovi vojojn, ne nur je manaĝera nivelo, sed ankaŭ teknologie, por sekurigi la subteneblon kaj pluteni la kostojn je akceptebla nivelo.

Ni devas esti tre singardemaj pri elspezado de la mono. Estas pli kaj pli da petoj pri multlingvismo, kvankam, kompreneble, estas voĉoj kiuj diras, ke estus pli bone havi komunan lingvon kaj ke tio simpligus aferojn. Tio ne estas vera. Estas grandega plimulto por multlingvismo je nacia nivelo.

**Kiom kostus nova lingvo, ekzemple la kroata?**

Estas tre malfacile tion kalkuli. La tuta multlingva buĝeto kostas por civitano ĉirkaŭ 2,40 eŭrojn. Estas ĉirkaŭ unu elcento de la EU-buĝeto, aŭ unu miliardo da eŭroj. Tamen estas tre malfacile diri, kiom kostas unu aparta lingvo, precipe kiam ni parolas pri novaj lingvoj. Ni dungas homojn je konstanta bazo. Ni ne povas kalkuli eĉ por la Komisiono, sen mencii la Parlamenton, Konsilion kaj aliajn instancojn.

**Ĉu estas ŝanĝoj rilate al multlingvismo kaj lingva politiko en la nova Traktato de la Eŭropa Unio?**

Ni havas novan artikolon 2. La Unio respektos sian riĉan kulturan kaj lingvan diversecon. Tio estas klara kaj tre grava principo de la Unio.

**Sed kion tiu principo signifas en la praktiko? Ĉu ĝi povas haltigi agadojn, kiuj minacas specifan lingvon?**

Ne, sed utilas havi tian tipon de politika principo. Mi ne estas jura spertulo. Ni havas EU-programojn, kiuj enkadrigas promociadon de regionaj kaj malpli uzataj lingvoj. Sed estas tro frue paroli, kion ni proponos en la venonta strategio. Ni pripensas kiel emfazi la promociadon de la lingva diverseco. Estas bonaj bazoj por promocii kaj fortigi niajn multlingvajn politikulojn. Tamen ni devas ankaŭ konsideri la principon de la suvereneco de Membro-Ŝtatoj.

**Multaj dunganoncoj de internaciaj kaj eŭropaj firmaoj indikas, kiel kvalifikon, ke la kandidato estu “denaska parolanto de la angla”. Ĉu tio estas malbona aŭ kontraŭleĝa laŭ via opinio?**

La angla ne sufiĉas. Tio ne estas kontraŭ la angla. Por ekhavi bonan laborpostenon en Rumanio, oni devas scii fremdajn lingvojn. Kun nur unu lingvo vi ne havas konkurencajn avantaĝojn. Pli kaj pli da homoj, kiuj parolas diversajn lingvojn, havas pli da ŝancoj.

# Lĝi veraj ambasadoroj de bona volo

Jarosław Czubiński, ĝenerala konsulo de Pollando en Kaliningrado, estas bone konata de partoprenantoj de la kaliningradaj Zamenhofaj Semajnfinoj. Amiko de Esperanto, li estas unu el la kvin laŭreatoj de la diplomo de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo pro “granda kontribuo al promociado de Esperanto en Baltio kaj en Kaliningrada regiono”. Nun, fine de sia kaliningrada deĵoro, same kiel antaŭ kvar jaroj, li respondas demandojn de *La Ondo*.

**Vi laboras en Kaliningrado jam ses jarojn. Kutime diplomatoj ne oficas tiom longe en la sama loko...**

Ankaŭ mi sentas, ke mia restado en Kaliningrado estas tro longa. Iusence mi estas “viktimo” aŭ “garantiulo” de bonaj kaliningradaj-polaj rilatoj. Mi substrekas la pozitivan signifon de tiuj vortoj. Mia alveno estis ligita kun la enkonduko de la nova viza regularo. En 2004 post la aliĝo de Pollando al EU la reguloj ŝanĝiĝis. Nun Pollando aliĝas al la Ŝengena zono, kaj mi devas plu resti ĉi tie, por ke la konsulejo trapasu la transiran peridon sen gravaj problemoj.

**Kiujn komplikajojn spertis la konsulejo pro tiuj ŝanĝoj?**

Granda defio estis stabiligo de la vizaj proceduroj kaj de aliro de niaj vizitantoj al tiuj demandoj dum momentoj de ŝanĝiĝo. Ke ni sukcesis, montras tio, ke jam nun, antaŭ la eniro en Ŝengenion, ni donas pli ol 500 Ŝengenajn vizojn ĉiutage — unu el plej grandaj nombroj inter ĉiuj konsulejoj de EU-landoj.

**Kion vi povas menci i kiel sukcesojn kaj malsukcesojn en Via laboro en Ruslando?**

Reciproka malkovro estas sukceso.

Malkovro de apudlimaj regionoj kaj de Pollando ĝenerale por vizitado de kaliningradanoj kaj ruslandanoj el aliaj regionoj. Statistiko konfirmas tion. Pasintjare 40% da ĉiuj vizitoj al Pollando el eksUSSR pasis tra Kaliningrada regiono. Mi povas ripeti la vortojn de la Kaliningrada guberniestro, Georgij Boos, ke Kaliningrado kaj la regiono estas loko de renkontiĝoj.

Se hodiaŭ ne eblas realigi ion, estonte eblos reveni al la sama temo. Tial mi ne konstatas definitivajn malsukcesojn. Restas, ekzemple, problemoj pri transirado de la limo, kiu tuŝas ankaŭ esperantistojn, kiuj deziras veni ĝustatempe al renkontiĝoj kaj kongresoj. Sed foje oni devas longe atendi ĉe la limo. Ni deziras, ke tiu proceduro estu pli agrabla.

**Kia estis Kaliningrado antaŭ ses jaroj? Kiel ĝi ŝanĝiĝis?**

Mi ne povas juĝi objektivite, ĉar ankaŭ mi estas kaliningradano kaj ne bone rimarkas, kiel evoluas la urbo, same kiel gepatroj ne rimarkas kiel kreskas iliaj infanoj. Sed miaj polaj gastoj diras, ke Kaliningrado rapide evoluas. En januaro 2002 mia impresoj estis, ke punkto daŭras la tutan diurnon. Estis mallume pro

malmultaj stratlampoj. Kvazaŭ insuloj da lumo estis vitrinaj de kelkaj vendejoj. Nun la urbo tage kaj nokte estas lumigata, diverskolora kaj bela.

Alia afero, kiun atentis la urbanoj, estas vojoj kaj trotuaroj. Kiel kaliningradano, mi kun ĝojo asertas, ke vivi en la urbo iĝis pli facile, la vivkvalito altiĝis. Ne nur pro klopodoj de la urbestro, kiu efektivas tiujn ŝanĝojn, sed ankaŭ pro la loĝantaro, kiu postulas, ke la urbo evoluu ĝuste tiudirekten. En Kaliningrado koincidas deziroj de la loĝantoj kaj agoj de la urbestro. Mi gratulas!

**Via familio restas en Varsovio. Ĉu vi ofte renkontiĝas kun la edzino kaj filinoj?**

Bedaŭrinde, malpli ofte ol ni deziras. Mallonge la familio estis kun mi. Poste la edzino revenis al Varsovio, kie ŝi havas bonan laboron, kaj la filinoj tiam vizitis lernejon. Nun ili studas en la Varsovia universitato slavajn lingvojn, unuavice, la bjelorusan, ukrainan kaj rusan.

Simile estis komence de la 1990aj jaroj, kiam mi oficis en nia ambasado en Minsko. Tiam la infanoj estis etaj kaj vidis min en Varsovio nur du fojojn jare, kaj ili aŭtomate nomis min “onklo”. Nun estas alia situacio, ni povas interkomunikiĝi rete, uzante kameraon. Krome, duonvoje inter Varsovio kaj Kaliningrado — en unu la plej belaj regionoj de Pollando, Varmio kaj Mazuroj — ni luis domon, kaj tie okazas renkontoj en vasta rondo, ĉar ĉiuj niaj amikoj scias pri la domo. Iufoje por mi ne sufiĉas loko, ĉar ĉiuj havas ŝlosilojn. Tia situacio donas al mi pli da tempo por laboro kaj vivo en Kaliningrado. Nia familio estas firma.

**En 2009 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko. Tiu decido estis malfacile akceptita, ĉar laŭ kelkaj Bjalistoko ne taŭgas kiel kongresurbo. Kion vi pensas pri tio?**

La urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, persone batalis por ke la kongreso en la jaro de la 150-jariĝo de Zamenhof okazu en Bjalistoko. Kiam la decido estis akceptita, li sendis mesaĝon al siaj oficistoj kun tri latinaj vortoj: “Veni, vidi, vici!”

Sendube, el la vidpunkto de aliaj polaj urboj kaj regionoj, Bjalistoko situas ĉe la orienta limo de Pollando, aŭ, kiel iuj diras, en *Pollando B*, la dua kategorio. Sed la urbo havas tiom da avantaĝoj, ke feliĉe aperis tiuj, kiuj rimarkis ilin.

Unue, en Bjalistoko la Eŭropa Unio ne nur finiĝas, ĝi ankaŭ komenciĝas tie. Bjalistoko do estas vizitkarto de EU. Due, estas bone, ke la urbo aprecas la grandegan rolon de Zamenhof, kiu penis spirite unuigi la popolojn de la mondo.

## Peter Zilvar — la Esperantisto de la Jaro 2007

*La Ondo de Esperanto* iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ap Fergus (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006).

### La rezulto de la voĉdonado:

Peter Zilvar. . . . .	5 voĉoj
Ilona Koutny, Andreas Künzli . . . . .	4 voĉoj
Renato Corsetti, Probal Dasgupta . . . . .	3 voĉoj
Peter Baláĉ, Kalle Kniivilä, Katalin Kováts, Paul Peeraerts, Baldur Ragnarsson . . . . .	2 voĉoj

Kvin kandidatoj ricevis po unu voĉon. Kvin proponitoj ne ricevis voĉojn. Germana esperantisto **Peter Zilvar**, prezidanto de Esperanto-Societo Sudharz, gvidanto de la Germana Esperanto-Centro en Herzberg estas proklamita la *Esperantisto de la Jaro 2007* pro diversflanka agado por kaj per Esperanto en Herzberg — la Esperanto-urbo. Lia agado estis intensa ankaŭ en 2007: serio de altnivelaj seminarioj kaj ekzamen-sesioj, starigo de novaj ZEOj, imitinda loka informado pri Esperanto, evoluigo de kunlaboro inter Herzberg kaj Góra (Pollando) k.a.

**Halina Gorecka**, sekretario





Jarosław Czubiński interparolas kun la eldonanto de *La Ondo*. (Fotis Alko)

Kaj trie, se tiu ĉi kongreso okazus ne en Bjalistoko, mi, kiel polo, ne komprenus tion. Ĉiu urbo havas malmultajn personojn pri kiuj ĝi fieras. Zamenhof por Bjalistoko estas persono, sur kiu oni povas bazi sian estontecon. Ĝuste tiel okazas. Ke urboficistoj lernas Esperanton, diras pri perspektivo. Mi gratulas la urbestron kaj la loĝantojn de Bjalistoko.

Mi certas, ĉar mi konas ĉi tiun bonan turisman regionon, ke la urbo eltenos la malfacilan organizan periodon, kaj ĉiuj kongresanoj estos kontentaj, eĉ se la kongresejo estos granda tendo. Antaŭ unu jaro en Varsovio pasis tre grava renkonto de pintaj reprezentantoj de la EU-ŝtatoj, kaj ili renkontiĝis en tendo. Neniu tiu ĝenas.

Se temas pri trafiko kaj vojoj, nun Pollando intence uzas eblecojn kiujn donas la aliĝo al EU, interalie por evoluigi la infrastrukturon de ĉiu regiono, ankaŭ de Bjalistoko. Mi, kiel varsoviانو, scias, ke baldaŭ oni povos atingi Bjalistokon duoble pli rapide ol nun.

**Kiel esperantistoj povas partopreni en dialogo inter Pollando kaj Ruslando, ankaŭ en la procedo de la unuiĝo de Eŭropo?**

Esperantistoj pli rapide ol la aliaj trovis la lingvon de dialogo, kaj tio estas la plej rekta respondo al tiu tre komplika demando. Sendepende de sia nacieco, esperantistoj kapablas interparoli kaj kompreni unu aliajn; eble tia estas estonteco, kiu atendas nin. Por ĉiuj la ĉefa problemo estas komenci interparoli kaj veni al konkludoj. Esperantistoj atingas tion pli facile, nomante per la sama vorto la saman fakton aŭ eventon. El tiu vidpunkto esperantistoj havas potencialon por iĝi veraj ambasadoroj de bona volo.

Tiu ĉi ambasadora rolo iugrade jam realiĝas. Mi bone memoras la Zamenhofajn Tagojn en nia konsulejo, kiujn vi kaj ni kunorganizis. Mi ĝojos, se reprezentado de la lando de Zamenhof ankaŭ en la estonteco daŭrigos la komunajn agadojn. Ni konstatas ankaŭ, ke esperantistoj sendepende de siaj loĝ-lando kaj nacieco, danke al sia universala aliro al la vivo, ne rimarkas la limojn, kion pruvas *La Ondo*, presanta la revuon en Pollando kaj la librojn en Litovio. Bonega ekzemplo de translima kunlaboro inter najbaroj, kiujn ligas la lingvo Esperanto.

La esperantista partopreno en la Ekonomiaj Forumoj en Krynica estas la ĝusta direkto, en kiu necesas labori, t. e. montri praktikajn elementojn de la utilo, kiun sekvigas kono kaj unuigo de ĉiuj surbaze de kono de Esperanto.

Mi povas certigi, ke kaliningradaj esperantistoj havos neniujn problemojn ricevi polajn vizojn. Eĉ pli, ni strebos fari tiel, ke la konsuleja kotizo prefere estu elspezata ne por vizaj formalajoj sed dum la restado en Pollando.

**Fine, pri Viaj planoj...**

Ŝercadire, kiel konsulo, kies lando en la proksimaj tagoj eniras la Ŝengen zonan, mi revas ĝisvivi la Novan Jaron. Aranĝi ĉiujn aranĝendajn vizojn por kaliningradanoj...

Mi esperas reveni al Varsovio some-re 2008. Se ĝis tiu tempo vi okazigos en Kaliningrado esperantistan eventon, mi invitos uzi la eblecojn de la konsulejo. Kalkulu pri subteno de la konsulejo de Pollando kiel lando de Zamenhof. Kvan-kam li estas homo de la tuta mondo.

Bonvolu transdoni al la esperantistoj miajn gratulojn okaze de la Kristnasko, Novjarmefesto kaj Zamenhofa Festo!

## La Esperantisto de la jaro

### Proponantoj

- Marija Belošević** (HR):  
ekssekretario de ILEI
- Višnja Branković** (IT):  
direktoro de *Orbis Pictus*
- Renato Corsetti** (IT): prezidanto de IEF
- Aida Čižikaitė** (LT): estrarano de ILEI
- István Ertl** (LU):  
tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo
- Judit Felszeghy** (HU): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro
- Edmund Grimley Evans** (GB):  
eksprezidanto de EAB
- Maritza Gutiérrez González** (CU): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano
- Hori Yasuo** (JP): prezidanto de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado
- Dafydd ab Iago** (BE): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU
- Aleksander Korĵenkov** (RU):  
redaktoro de *La Ondo de Esperanto*
- Bruno Masala** (FR): komitatano de IKUE
- Valentin Melnikov** (RU):  
poeto, ĵurnalistoj, tradukanto
- Barbara Pietrzak** (PL): kunlaboranto de la Esperanto-redakcio de la Pola Radio
- Yamasaki Seikō** (JP):  
membro de la Akademio de Esperanto
- Ziko van Dijk** (DE/NL): historiisto, aŭtoro de *Die neutrale Sprache*

### Elektantoj

- Petr Chrdle** (CZ):  
direktoro de KAVA-PECH
- Michel Duc Goninaz** (FR):  
lingvisto, redaktoro de NPIV
- Agneta Emanuelsson** (SE):  
estrarano de FEM
- Gbeglo Koffi** (TG): administranto de la Afrika Centro Esperantista
- Iłona Koutny** (PL): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM
- Lee Chong-Yeong** (KR):  
eksprezidanto de UEA
- Stano Marček** (SK):  
redaktoro de *Esperanto*
- Geraldo Mattos** (BR): eksprezidanto de la Akademio de Esperanto
- Stefan Maul** (DE):  
ĉefredaktoro de *Monato*
- Atilio Orellana Rojas** (NL/AR):  
direktoro de IEI, sekretario de ILEI
- Sergio Pokrovskij** (RU):  
sciencisto, tradukanto, eseisto
- Anna Margareta Ritamäki** (FI):  
prezidanto de EAF
- Roland Rotsaert** (BE): kasisto de IKEF;  
redaktoro de *La Merkato*
- Josef Shemer** (IL): prezidanto de ELI
- Ljubomir Trifončovski** (BG):  
verkisto, redaktoro

### Sekretario

- Halina Gorecka** (RU):  
eldonanto de *La Ondo de Esperanto*

## UEA invitas prelegi en Roterdamo

Dum la 93a UK en Roterdamo okazos la 61a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel (✉ 767, IL-71799 Makabim, Israelo; ✉ amri@huji.ac.il) ĝis 31 jan 2008.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego rajtas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko.

Estos bonvenaj proponoj ligitaj al la kongresa temo *Lingvoj: trezoro de la homaro* aŭ al la 100-jariĝo de UEA. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto. La proponoj estos prijuĝataj de la Komisiono pri IKU kaj fine konsiderataj de la Estraro de UEA.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per modesta honorario. Pliaj detaloj troviĝas en la IKU-paĝo ĉe <http://uea.org/dokumentoj/IKU/>.

GK UEA



## La Civito kontraŭ mortopuno

Laŭ oficiala invito de Marco Cappato (la EU-parlamentano kiu plej aktivis por nia lingvo en 2004) la Esperanta Civito partoprenis en la internacia pac-konferenco okazinta 6–7 dec en Bruselo. La Civiton reprezentis la Konsulo mem.

La konferenco kunigas multajn ne-registarajn subjektojn, kiuj subtenas la kampanjon por la monda moratorio pri mortopuno. Laŭ optimismaj deklaroj de la itala registaro (kiu kunordigas la EU-membroŝtatojn, bloke aliĝintajn al la kampanjo) post deko da tagoj la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj definitive aprobas la moratorion.

HeKo

## Roterdamo malfermas la pordojn

La 27a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA (24 nov 2007) allogis 110 vizitantojn el 18 landoj. Por la dua fojo la prelegoj de la Malferma Tago okazis en la nova konferencejo de la UEA-domo, sed en la antaŭa fojo tie ankoraŭ mankis ŝovebla son-izola muro inter la ĉambroj Kanado kaj Aŭstralio. Ĉi-foje ambaŭ ĉambroj estis kunigitaj en unu grandan salonon po du horojn komence kaj fine de la tago, sed dum tri horoj okazis en ili samtempe du paralelaj programoj.

Komence la libroservisto Ionel Onet konatigis al la publiko la plej lastajn novaĵojn de la Esperanta merkato. La ĉefa gasto de la Tago estis la konata historiisto d-ro Ulrich Lins, kiu faris du prelegojn, “Esperanto kiel lingvo kaj ideo en orienta Azio” kaj “Mia alproksimiĝo al Zamenhof”. La dua prelego ligiĝis al lia redakta laboro super la sesa eldono de la klasika verko *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat, kiun UEA lanĉis en Jokohamo. Alia historiisto, d-ro Ziko van Dijk, elpaŝis en sia ne malpli konata rolo de fakulo pri Esperanto-informado, prezentante sian plej freŝan libron, *Informado praktike*. Jorge Camacho prezentis ne nur sian propran novan poemaron *Eklipsas*, sed ankaŭ la volumon *La lingvo serena* kun poemoj kaj eseoj de la Nobel-kandidato Baldur Ragnarsson, kaj la novan periodaĵon *Beletra Almanako*. Sian lernolibron *Esperanto per rekta metodo* prezentis Stano Marček, kiu lanĉis ĝian nederlandan eldonon en la Malferma Tago. Kvankam lanĉita antaŭ kelkaj jaroj, al multaj vizitantoj ankoraŭ nova estis ankaŭ la DVD-kurso *Esperanto — pasporto al la tuta mondo*, kiun prezentis Lusi Harmon kaj Diana Babeck-Weichert.

Kun 12 ekzempleroj *Vivo de Zamenhof* estis la plej furora libro de la tago. Sekvis ĝin *Informado praktike* (11) kaj la bildstrio *Zamenhof bildrakonte* (10). Entute la Libroservo de UEA vendis librojn k.a. varojn por 2858 eŭroj.

La vizitantoj povis konatiĝi ankaŭ kun ĝisnunaj kaj estontaj projektoj de E@I (Esperanto ĉe Interreto) kaj kun la agado kaj celoj de la eŭropa Esperanto-partio *Eŭropo-Demokratio-Esperanto*. La programon finis unuhora renkontiĝo kun estraranoj de UEA.

La venonta Malferma Tago (26 apr 2008) estos dediĉita al la centa datreveno de la fondo de UEA.

GK UEA



## Esperanto por harmonia socio

La sepa Ĉina Kongreso de Esperanto okazis 7–8 dec en Kantonon, la ĉefurbo de Guangdong-provinco en suda Ĉinio, kun pli ol 300 kongresanoj el 26 ĉinaj provincoj kaj Hongkongo, kaj samideanoj el Pollando, Hispanio kaj Finnlando.

La temo de la kongreso estis “Realigi sciencan koncepton de disvolviĝo kaj apliki Esperanton por servi al konstruado de la harmonia socio”.

Chen Haosu, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, en sia parolado emfazis: “Esperanto celas akcelon de interfluo, kunlaboro, paco kaj evoluo. Ni ĉiuj obeas al ĝenerallaj cirkonstancoj de landa konstruado kaj monda paco, ni kune klopodu por realigi konstruadon de la harmonia socio kaj konstruado de longdaŭre paca kaj kune prospera harmonia mondo”.

La kongreso diversmaniere traktis la temon kaj prezentis opiniojn pri disvolvado de la Esperanto-movado en Ĉinio. Reprezentantoj de kvar grupoj regionaj kaj fakaj (fervojistoj, Esperanto-edukado, komercado kaj junularo) diskutis la raporton de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ili opiniis, ke la ĉinaj esperantistoj devas fari sian eblon por kontribui al la konstruado de la harmonia socio de Ĉinio kaj de la ĉina Esperanto-movado, kaj donis pozitivajn proponojn pri la venontaj agadoj de diverslokaj Esperanto-organizoj en la nova situacio.

Laŭ [Esperanto.china.org.cn](http://Esperanto.china.org.cn)

Ĉi tiu kajero estas je kvar paĝoj pli granda ol kutime. Tioman amplekson *La Ondo* havos dum la tuta jaro 2008 danke al donaco de nia ruslanda leganto, kiu deziras resti anonima.

Ni kore dankas la donacinton kaj esperas, ke lian ekzemplon sekvos aliaj, ja malgraŭ la kreskintaj kostoj ni ne ŝanĝis la abonprezon ĉi-jare. Pagan-te vian kotizon, memoru pri niaj fondusoj *Amiko*, *Abonhelpo* kaj *Ilaro*.

Dankon!

LOdE

## Esperanto: lingvo, kulturo, movado

La unua kolokvo de Kuba Esperanto-Asocio *Esperanto: lingvo, kulturo, movado* okazis 16–18 nov en Havano. Ĝi arigis pli ol 70 esperantistojn el la tuta lando en la sidejo de la Malgranda Baziliko de la Monaĥejo Sankta Francisko de Asizo en la malnova urboparto.

La programo inkluzivis prelegojn pri historio de la kuba Esperanto-movado, pri nuntempo kaj estonteco de la movado internacia, pri kulturaj kaj aliaj temoj.

Por la unua fojo la kuba ILEI-sekcio okazigis ekzamenan sesion de KEA kies rezulto estis tre pozitiva. La kubaj ekzamenoj celas daŭre plialtigi la lingvajn kapablojn de la kuba esperantistaro por alfronti estonte gravajn eventojn internaciajn kiel la Unua Kultura Festivalo de KEA planata por novembro 2008 kaj eventuala okazigo de Universala Kongreso en la insulo en la jaro 2010.

Alia grava programero estis Forumo pri esperantismo, ekesto kaj tendencoj surbaze de dokumentoj kaj manifestoj de la Esperanto-movado. Oni solene malfermis ekspozicion pri Esperanto en la provinca biblioteko, kaj okazis urba promenado kun halto ĉe la Zamenhofa memortabulo en publika halo de tre konata komerca centro. La tabulon oni starigis en Havano en julio 1990 okaze de la 75a UK okazinta en Kubo.

La kulturaj vesperoj inkluzivis teatran prezenton, koncerton de la elstara kuba aktorino Georgina Almanza, muzikan koncerton en Esperanto kaj ferman ceremonion kaj feston en la centra sidejo de KEA en Havano.

La kolokvo donis okazon informi pri Esperanto en diversaj amaskomunikiloj.

**Maritza Gutiérrez González**

## Esperanto 2 — Prezidento 2

3 nov okazis futbala ludo inter la teamo *Esperanto FC* kaj la Prezidenta teamo *Les messagers FC* (la Prezidento de Burundio starigis teamojn en ĉiuj grandaj urboj kaj ĉi-tiuj teamoj ricevas lian subvencion). La matĉo estis tre interesa, kaj multaj homoj venis spekti ĝin — bona okazo por varbi homojn por lerni Esperanton kaj ni atingis nian celon.

La Prezidenta teamo gajnis 2–0 en la unua parto, sed en la dua *Esperanto FC* faris miraklon kaj egaligis la rezulton: 2–2. La trejnisto de la Prezidenta teamo gratulis niajn teamanojn kaj petis nin reludi kun ili poste, ĉar niaj teamanoj (laŭ li) ludas discipline.

**Sabiyumva Jérémie**

## Tri renkontiĝoj en/apud Rio

2 dec okazis en Paraíba do Sul, 123 km de Rio-de-Ĵaneiro, la **70a Esperantista Renkontiĝo de la Paraíba Valo**.

57 homoj el 11 urboj kunvenis por aŭskulti entute dek prelegojn pri literaturo, brazila kaj eŭropa historio, matematiko, medicino kaj meditado.

Katolikaj esperantistoj organizis specialan kunvenon. Membroj de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro pritraktis sian venontjaran kongreson. Oni krome kantis kaj estigis konversaciajn rondojn. Neesperantistaj vizitantoj konatiĝis kun la esperanta kulturo.

Lernantoj de la ĵus finiĝinta baza kurso en la najbara urbo Três Rios ricevis diplomojn. Tri lokaj gazetoj informis pri la evento.



*Givanildo Costa prezentas la programerojn en la Spiritisma Esperantista Renkontiĝo.*

La saman tagon (2 dec) en Rio okazis la **14a Esperantista Spiritisma Renkontiĝo de Ŝtato Rio-de-Ĵaneiro**.

Proksimume 70 samideanoj kunvenis en la spiritisma centro *Amo al la Vero*. Oni okazigis programerojn por infanoj kaj por tiuj, kiuj disvastigas Esperanton en la spiritisma medio. Posttagmeze la radioparolisto Givanildo Costa gvidis la artan programon kun kantoj de Neide Barros Rêgo.

9 dec Rio-de-Ĵaneiro akceptis la **4an Esperantistan Forumon de Botafogo Esperanto-nukleo** kun 40 ĉeestantoj.

Elmir dos Santos Lima prelegis pri la 120-jariĝo de la internacia lingvo. Tuj poste, Sylla Chaves, Givanildo Costa, Jair Salles kaj Aloísio Sartorato debatis pri lernolibroj, vortaroj kaj instruado de Esperanto. João da Silva Santos prelegis pri la precipaj trajtoj de la personeco de Zamenhof. Dum la arta programo Neide Barros Rêgo kantis kaj deklamis.

La forumon organizis Botafogo Esperanto-nukleo, la plej elstara grupo de la suda regiono de Rio-de-Ĵaneiro.

**Fabiano Henrique**

## Tradicia Kulturfestivalo

La tradicia 19a Esperanta Kulturfestivalo okazis 30 nov – 2 dec 2007 en la nord-bohemia urbo Ústí nad Labem (Ĉeĥio).

La vendreda programo apartenis al interkona vespero de la ĉeestantoj, venintaj el diversaj lokoj de Bohemio, Moravio kaj Germanio.

La ĉefa tago de la festivalo estis sabato. En la trihora prelega matineo oni aŭskultis sep prelegojn akompanatajn de vigla diskuto. Mi menciis ĉeeston de ĉeĥa poetino Marie Dolistová, kies poemoj estis prezentitaj paralele kun la Esperanta traduko. Ŝi emociite esprimis sian miron pri la surprize alta tradukeblo de siaj poemoj en Esperanton, pri la belsoneco de Esperanto kaj pri libera parolfluo de la ĉeestantoj dum la diskutoj.

Sabate posttagmeze okazis spirita koncerto en la preĝejo de Sankta Paŭlo kun klasikaj muziknumeroj prezentitaj en Esperanto fare de profesiaj artistoj. La programo estis finita per komuna kantado de Betovena odo *Al ĝojo*.

Vespere, en impona salono de la urba artlernejo, okazis koncerto de mondkonataj melodijoj prezentitaj de profesiaj kantistoj kaj muzikistoj: Miroslav Smyčka, Kateřina Kudlíková, Jan Duda, Václav Urban, Tereza Urbanová, Bohuslava Převrtilová, Josef Vích kaj Václav Vanc kun siaj filoj. Post la artprogramo la publiko komune kantis, kun pianakompano, kelkajn kristnaskajn kantojn en Esperanto. Fino de la vespero estis dediĉita al tombolo. La sabatan programon partoprenis ĉ. 50 esperantistoj.

Dimanĉe unu grupo de interesatoj ekskursis al observa turo, de kie estas impona disrigardo al České středohoří (Mezbohemia montaro), al Krušné hory (K. montaro) kaj al urbo Ústí nad Labem mem, ĉirkaŭata de romantikaj montetoj kaj trafluata de la plej granda rivero de Ĉeĥio, Labe (Elbo).

La dua grupo kunvenis en salono, kie oni aŭskultis programon pri Jan Amos Komenský (Komenio), lia biografio kaj ĉefaj, mirinde multaj, verkoj. Oni ankaŭ aŭdis liajn profetajn vortojn koncerne utilon kaj neceson de internacia kompreniĝo surbaze de unu komuna lingvo. Lia koncepto, esprimita antaŭ pli ol tricent jaroj, respondas ĝenerale al la ideoj de Esperanto.

La nivelo de la 19a IKF estis tre alte aprezita de la ĉeestantoj, kiuj esprimis deziron, ke post unu jaro oni okazigu jubilean 20-an IKF.

**Vlastimil Novobilský**

## La 19an fojon en Morbecque

95 staĝanoj el Belgio, Britio kaj Francio partoprenis 17–18 nov en la 19a Eŭropa Rendevuo Esperantista en Morbecque (Norda Francio). Por ili spertaj instruantoj gvidis kvin diversnivelaĵajn kursojn.

Ĉi-jare en la distra programo, la sabatan vesperon, grandan sukceson gajnis JoMo, kiu koncertis en pli ol 20 lingvoj.

Dimanĉon posttagmeze, Maryvonne Robineau prelegis pri la temo *Survoje al Kompostelo* kaj prezentis mirindajn diazopozitivojn pri sia vojaĝo. Ŝi sukcesis revigi nin. Kristin Tytgat el Antverpeno prelegis pri interpretado kaj la rolo de Esperanto en EU-komunikado. La belga klubo el Gent proponis riĉan libroservon.

En 2008 la staĝo en Morbecque disvolviĝis 7–9 nov, por memorfesti la cent-jariĝon de la Norda Federacio kaj la dudek-jariĝon de la Eŭropa Rendevuo. Escepta programo estos proponita.

**France Valet**

JoMo unue kantis en Morbecque, poste en Zagrebo



## Ora jubileo de la Zagreba SEK

Tri tagojn Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo festis sian 50-jaran jubileon. Ĝin fondis studentoj-esperantistoj en 1957 kaj de tiam tra ĝi miloj da studentoj kleriĝis pri Esperanto. Pluraj membroj de SEK uzis la lingvon ĉefe kiel kulturalan ilon. Tiel SEK kreis Pupteatran Internacian Festivalon en 1968 kaj Internacian Kulturalan Servon en 1972. En 2001 sine de SEK naskiĝis Urba Festivalo de Zagrebo.

El SEK venis membroj, kiuj grave kontribuis al la internacia Esperanta vivo: Krešo Barković dum jardekoj

laboris en Parizo por SAT, Nikola Rašić estis dum pluraj jaroj oficisto en UEA, Vida Jerman en SEK ekkonis Esperantan teatron, Spomenka Ŝtimec post meti-jaroj en SEK fariĝis esperantlingva verkisto...

8 dec la jubileon komencis Gazetara Servo de SEK, el kio rezultis kelkaj gazetartikoloj, radio kaj TV-elsendo. La aktuala teatraĵo de SEK pri krosŝipo *Ludoviko*, prezentita 9 dec, allogis 70 spektantojn kaj desegnis la bonan mondon de estonteco, “en kiu eĉ memzorgantoj estos sataj”. Aŭtoris ĝin teamo sub reĝisorado de Vanja Radovanović.

SEK ekde fondiĝo rilatis al ekskursoj, tial la dua festotago gvidis al la montopinto Sljeme, al kiu Nikolao Hohlov dediĉis sian poemon. En montara domo okazis Esperanto-koncerto de zagreba operkantisto Neven Mrzlečki.

La festo kulminis 10 dec. Kantisto JoMo gastis en matena programo de HRT kaj invitis zagrebanojn al la ĉefa placo, kie li vespere kantis plurlingve kaj brile informis pri Esperanto. Granda ekrano disportis lian muzikon tra la tuta placo.

En la Eŭropa domo post la ĉefplaca koncerto kunvenis pli ol cent iamaj membroj por ĝui kunestadon, aŭdi prezentojn pri la klubo, kaj spekti filmon pri la historio de SEK. Kvin plej signifaj prezidintoj de SEK (Vjekoslav Morankić, Zlatko Tišljar, Ivan Špoljarec, Anika Jagnjić, Vanja Radovanović) prezentis sian jardekon en la klubo.

La knabinoj de la nuna klubo generacio vestis sin en la stilo de la kvindekaj jaroj, omaĝe al la jaro 1957, la jaro kiam SEK akiris juran personecon kaj ekvivis sendepende de la societo de plenkreskuloj. La knaboj surmetis solenajn kostumojn kaj papiliajn kravatojn (vd. pĝ. 27).

Je noktomezo estis proklamite ke la novan monan premion *Kalendulo* por 2007 (500 eŭroj) gajnis SEK. La kulturalan eventon ebligis urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj sporto, ja SEK estas parto de la kroata publika vivo.

**Spomenka Ŝtimec**

Jubilea torto en Zagrebo (Fotis Vladimir Kamenski)



## Centjariĝo en Rijeka

Solenado de la centjara jubileo de la unua Esperanto-organizaĵo en Kroatio komenciĝis matene 17 nov 2007, kiam cento da kroataj kaj alilandaj esperantistoj kunvenis en Korzo — la ĉefstrato kaj promenejo de la urbo Rijeka. En la domo n-ro 18 sur Korzo, ekde la fondiĝo (28 sep 1907) estis la sidejo de Adriatika Ligo Esperantista (ALE) — la unua Esperantista organizaĵo en Kroatio.

Boris Di Costanzo, la nuna prezidanto de Esperanto-Societo Rijeka, malkovris memortabulon kaj legis liston de 37 nomoj de la unuaj membroj de ALE.

Post la malkovro de la memortabulo la grupo iris al la Popola Legejo (Korzo n-ro 24), kie antaŭ kvin tagoj estis malfermita ekspozicio de Esperanta literaturo. Tie okazis prezentado de jubilea poŝtkoverta kun stampo de la unua tago (28 sep 1907). Sur la koverta troviĝas nomoj kaj adresoj de la unuaj membroj de ALE. Dum la prezentado de la poŝtkoverta, okazis radioelsendo pri la jubileo de la stacio Rijeka por aŭskultantoj de Kroata Radio.

Sekvis vizitado de la triĉambra ejo de la Esperanto-Societo Rijeka, tagmanĝo kaj trarigardo de la urbo, gvidita de Emil Hrvatino kaj Vjekoslav Morankić.

La vesperan programon en ĉeesto de 150 personoj komencis la kroata himno. La urbestro de Rijeka, Vojko Obersnel, en sia salutparolado emfazis la signifon de la jubileo kaj donacis al la grupo blazonon de Rijeka. La paroladon de la urbestro kompletigis multaj gratuloj el eksterlando kaj el Kroatio. Jubilean referaĵon prezentis en la kroata Boris Di Costanzo kun traduko de Spomenka Ŝtimec al Esperanto.

En la muzika kaj amuza programo partoprenis virina koruso UĈKA el Matulji, pola kanzonisto Georgo Handzlik, aktorino kaj kantistino Vida Jerman kaj operkantisto Neven Mrzlečki. La prezidanto de la loka Esperanto-Societo esprimis dankon al la aŭspiciantoj, donacintoj, subtenantoj kaj al membroj de la Societo kiuj sukcesigis la jubilean solenaĵon. Post kantado de *La Espero* la prezidanto invitis ĉiujn al koktelo kun naskiĝtaga kuko ornamita per la Jubilea simbolo.

La ĉeestantoj ricevis saketon kun donacetoj inkluzive de prospekto pri Rijeka en Esperanto kaj kruĉeto kun surskribaĵo *Tostu kun ni*.

TV stacio *Kanal R*, tagĵurnaloj *Novi List* kaj *La Voce del Popolo* informis pri la jubileaj okazaĵoj.

**Boris Di Costanzo**





## Popolkanto per Esperanto

15 nov oni filmis Esperanto-kantadon de ĥoro *Heura* el l' Hospitalet de Llobregat. Ĝi kantis la katalunan popolkanton *Montaroj de Canigó* en la preĝejo de Sankta Maria de Mèrida. Tiu ĉi filmado omaĝas la katalunan folkloriston Joan Amades.

Joan Amades, la aŭtoro de la kvinvoluma *Kataluna Folkloro* kaj de aliaj gravaj verkoj, estis ankaŭ fervora esperantisto, prezidanto de Kataluna Federacio de Esperanto. Li publikigis kolekton de katalunaj kanzonoj tradukitaj al Esperanto, inter ili *Montaroj de Canigó*, kiun bonege interpretis *Heura*.

Martí Guerrero

## Nova Centro en Budapeŝto!

(Ret-info) 20 nov 2007 en Budapeŝto estis inaŭgurita nova Esperanto-Centro de *Eventoj*. La nova sidejo servas kiel hejmo por la Esperanto-Lingvolernejo de *Lingvo-Studio*, por la Kultura Esperanto-Asocio ĉe *Eventoj*. Ankaŭ la Hungaria Esperanto-Junularo (HEJ) trovis ĉi tie sian novan bazejon.

La nova centro ampleksas 114 m<sup>2</sup>, ĝi havas tri komplekse ekipitajn salonojn, te-kuirejon kaj organizan oficejon, kiuj povas servi kiel kursejo kaj/aŭ programo por movadaj kunvenoj: aŭdaj-videaj sistemoj, projektilo, komputiloj, interreta konekto helpas la Esperantajn organizajn aferojn.

La novan centron en malvasta rondo inaŭguris Szilvási László, prezidanto de la Kultura Esperanto-Asocio. En la festo ni dankis ĉiujn helpantojn, niajn kunlaborantojn, dankis la brilajn kaj elstarajn sukcesojn de niaj instruistoj. Gvidantoj de HEJ diris publikan dankon al la fondintoj kaj mecenintoj de "Premio Melinda", al la gepatroj de Szekeres Melinda.

Adreso de la nova Esperanto-Centro estas: strato Ŭllői 95, en la 9a distrikto en Budapeŝto apud la metrohaltejo *Klínikák*. Enirporda sonorilkodo: 20.

En la nova ejo nun en vesperoj funkcias la lingvolernejo, deĵorado pri movadaj aferoj okazas laŭbezono.

Szilvási László

## Esperanto-urbo invitas

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg invitas al la Esperanto-urbo Herzberg en 2008 (antaŭ la 93a UK en Roterdamo).

**1–3 feb.** 36a Studsesio por klerigado (faka klerigseminario).

**8–10 feb.** Lingvokursoj por komencantoj ĝis parolantoj.

**11–15 feb.** Postkursa programo kun vintrosport- kaj ekskurseblecoj, vizitoj de muzeoj, naĝejoj, saŭnejoj, uzebleco de la biblioteko kaj vidbendservo.

**4–6 apr.** 37a Studsesio por klerigado (faka klerigseminario).

**11–13 apr.** Lingvokursoj por komencantoj ĝis parolantoj.

**14–18 apr.** Postkursa programo kun ekskurseblecoj, vizitoj de muzeoj, naĝejoj, saŭnejoj, uzebleco de la biblioteko kaj vidbendservo.

**5–9 maj.** Interkultura Semajno kun prelegoj pri interkulturaj temoj, diskutoj, muziko.

**7–11 jul.** Biblia Semajno (aliĝo ĉe pastro Eichkorn).

**11–18 jul.** UK-Antaŭkongreso.

**11–18 jul.** Konferenco de INA (Internacia Naturkuraca Asocio) kun prelegoj pri alternativa medicino, kuracmetodoj, bonfarto kaj bonsento.

[esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

<http://www.herzberg.de>

<http://ic-herzberg.de>

## Unufraze

★ Franca parlamentano Bruno Le Roux (grupo socialista, radikala, civitana, diversa maldekstro) faris skriban demandon al la ministro de edukado Olivier Darcos pri lingvaj aferoj k proponis enkonduki Eon en la abituriantan ekzamenon. (Henri Masson)

★ Populara ret-serĉilo *Google* envicigis Eon inter 43 lingvojn, al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektivigata serĉo. (E@I)

★ Por iniciati k kunordigi diversajn agadojn dum la jaro 2008, deklarita de UN Internacia Jaro de Lingvoj, la Estraro de UEA elektis laborgrupon sub la gvido de vicprezidanto de UEA, Ranieri Clerici. (GK UEA)

★ Eŭropa E-Unio ricevis subvencion de EU por la projekto *Alieco kiel valoro* k enoficigis en Bruselo denaskan e-istinon Maja Tišljár. (*Tempo*)

★ Probal Dasgupta prezentis en Eo referaĵon "La sciado, la procezo, kaj la poezio" pri poezio de Baldur Ragnarsson en konferenco "La literaturo kiel sciosistemo" en la universitato Jadavpur en Kolokato (Barato); la ĉeestantoj sekvis la raporton laŭ disdonitaj anglalingvaj tekstoj. (Landa Agado).

★ 4 dec 2007 ambasadoro de Japanio por Litovio, Masaki Okada, aranĝis akcepton okaze de Nacia Tago de Japanio, al kiu estis invitatitaj ĉ. 300 eminentaj personoj de Litovio inkluzive de la prezidanto k respondeca sekretario de LitEA — Povilas Jegorovas k Irena Alijoŝiūtė. (P.J.)

★ 16 nov Aleksander Korĵenkov lekciiis pri planlingvoj k Eo kadre de la kurso "Enkonduko en la lingvosciencan" por studentoj pri filologio de la unua studjaro de la Ruslanda Ŝtata Universitato Emanuelo Kantio. (LBO)

★ En la libroservo de la Jokohama UK plej bone vendiĝis *Internacia Kongresa Universitato 2007* (88 ekz.), *Vivo de Zamenhof de Privat* (75 ekz.), *Historio por malfermi estontecon* (74 ekz.), *Lernolibro de Marĉek por japanoj* (72 ekz.) k *Japanio kalejdoskope* (67 ekz.); totala vendosumo: 31.042 eŭroj. (GK UEA)

★ 15–17 sep 2007 okazis en la ĉina havenurbo Rizhao jarkunveno de "IKEF-Ĉinio" kun 34 komercistoj k entreprenistoj el Ĉinio, Uzbekistano kaj Brazilo. (*Esperanto*)

★ En la aliĝieklameno al la Universitato de Kostariko la plej altan noton (800 poentoj el 800 eblaj) ricevis 17-jara Silvio Lucio Curtis Guidon, kies e-istecon menciis gazetaro. (Universitato)

# Jaro 2007: niaj atingoj kaj fiaskoj

En la decembra *Ondo* komenciĝis serio de ekspres-enketoj. La unua demando celis eldonistojn, kiuj respondis pri eldonotaj libroj. La dua demando, sendita al dek kvin diverstendencaj esperantistoj, tekstis: “Kiu(j)n Esperanto-evento(j)n en la jaro 2007 vi taksas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?” Dek demanditoj respondis.

**La plej pozitiva:** La UK kaj IJK en Azio, kiuj kune kun la Azia kongreso, montras al ni, kiom forta estas la Esperanto-movado en Azio. Bonŝance Esperanto ne plu estas nur eŭropaĵo.

**La plej malpozitiva:** La eksternorma interesiĝo de esperantistoj pri stultaj (kion skribis difinita reta bulteno hieraŭ vespere, kaj kion respondis difinita monda organizaĵo) aŭ pri historiaĵoj. Estas orgio de historio en la movado, kiu en ekonomie evoluintaj landoj transformiĝas de movado de batalantoj al movado de eks-batalantoj. Gravus kion faris esperantistoj en la pasinteco nur se ni pretas fari same.



**Renato Corsetti** (Italio)  
Prezidanto de IEF

Mi taksas kiel la plej pozitivan la aperon de *Historio por malfermi estontecon*: ĉina-japana-korea komuna mezlerneja lernolibro pri la moderna historio de la tri landoj. Mi estas certa, ke io simila estus verkebla en eŭropaj aŭ sudaziaj medioj — kaj ke verki ĝin devigus al simila 42-kapa verkantaro vere plenkreski.

Al mi persone la plej negativa *fakto* en 2007 restas io jam konstatita antaŭ kelkaj jaroj — ke la esperantigita finna klasikaĵo *Sep fratoj* fariĝas legebla por mi nur, se mi en 2005 vojaĝas al Finnlando, persone prunteprenas la libron de amiko, kaj legas ĝin. La libro restas elĉerpita; pro kopirajtaj problemoj tiun tradukon ne eblas reeldoni; neniu kuraĝas entrepreni duan tradukon post tiel brila pioniraĵo. *Mi* ĝuis ĝin; ĉu la libro restos ankoraŭ longe nealirebla al aliaj?



**Probal Dasgupta** (Barato)  
Prezidanto de UEA

Mi opinias, ke invit-projekto de Japana Esperanto-Instituto por la 92a UK en Jokohamo estas la plej pozitiva Esperanto-evento en la jaro 2007. Ĝi sukcese partoprenigis en UK 20 elstarajn esperantistojn, kiuj havas problemojn pri kotizo kaj vizo en evoluantaj landoj de Azio, kaj efike kaj iniciateme antaŭenpuŝis la azian movadon. Ĝi modele kreis kaj prezentis bonan sperton kuraĝigi esperantistojn, grandigi aliĝ-landojn kaj vekti atenton kaj intereson de neesperantistoj al Esperanto. Ĝi havas gravan signifon por okazigo de la venontaj UK-oj.

Mi ne povas elekti la plej negativan Esperanto-eventon en la jaro 2007, sed ŝajnas al mi, ke estas bedaŭrinde, ke esperantistoj el Afriko ne aperis en la Jokohama UK. Tio estas nesufiĉa por UK nomata *monda* kongreso.

**Wu Guojiang** (Ĉinio)  
UEA-komisiito pri ĝemelurboj

Mi respondas, sed tute persone, pri la atingoj:

**Kongreso:** Kompreneble la UK en Jokohamo. Mi estas ĝoja, ke multaj alte taksis ne nur la kongreson sed ankaŭ Japanion mem, menciante, ke Japanio estas bela kaj pura. Iu eĉ diris, ke ŝi vivis en Japanio kvazaŭ en bela sonĝo.

**Renkontiĝo:** La 7a Internacia Himalaja Renkontiĝo estis la plej bela por mi, renkonti karajn nepalajn amikojn kaj grimpante monton en Lantang-Regiono altan 3300 metrojn. La vetero estis bela kaj ĉiutage mi ĝuis la belan pejzaĝon.

**Libroj:** La subajn mi eldonis.

*Raportoj el Japanio 10.* Mi komencis verki raportojn pri Japanio en 1992 kaj la unua libro eldoniĝis en 1998. Poste ĉiujare mi eldonis novan libron en la serio, kaj ĉi-jare ĝi atingis la 10an numeron.

*Vivoj tra la mondo.* Post *Monatoj tra la mondo* ni povis eldoni la duan en la serio *Tra la mondo*, rete kolektinte raportojn el 11 landoj.

*Esperanto kaj mi.* Kiel prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, mi kredas, ke la movado progresis, formante pli da solidareco en Azio. Rezulte de tio, mi povis kolekti 180 eseojn el 17 landoj kun la temo “Esperanto kaj mi”. Tio estas belega rezulto, kaj mi fieras pri tio.

**Hori Jasuo** (Japanio)  
Prezidanto de KAEM

Mi taksas pozitiva la grandan altnivelan konferencon, kiu okazis 13 apr en Ruslanda akademio pri edukado. Kvankam rezulte de tiu konferenco Esperanto ne estis enkondukita kiel studobjekto en mezlernejoj, oni almenaŭ ekparolis pri tio iom serioze. Antaŭe neniuj esploroj pri tio estis farataj, kaj “fremda lingvo” jam delonge en ruslanda edukado iĝis sinonima al “angla lingvo”. Mi pensas, ke Ruslando subtaksas sian influon al la monda elekto de internacia lingvo.



Alia, pli “esperantuja”, pozitiva novaĵo estis por mi la nova iniciato de la krea grupo E@I, kiu planas fari retan informojn, kiu provizore havas la nomon *Esperanto aktuale*. Tiu informejo provizore pretajn materialojn (ĉefe novaĵojn) pri Esperanto kaj la mondo parolanta en tiu lingvo; ekzistos multaj lingvaj versioj kun laŭebla (do eble elekta kaj “alproprigita”, facile farebla) traduko de tiuj materialoj. Tiel povas okazi plenumo de la nuna vakuo pri informado pri Esperanto en multaj naciaj lingvoj.

Mi iom longe pensis kaj ne rememoris ion vere negativan. Negative impresis min la antaŭnelonga novaĵo pri nuligo de oficialaj rilatoj inter ILEI kaj UNESCO. Krome, mi atendis ion pli impresan de vizitita somera E-renkontiĝo, sed mi ne nomu tiun eventon, ĉar eble kulpas ne la evento, sed mi mem.

**Sl. Ivanov** (Ruslando)  
Redaktanto de *E-novosti.info*

Ĉu vi ŝatas ĉi tiun rubrikon? Se jes, bonvolu skribi, kiuj demandoj estu donitaj en la venontaj ekspres-enketoj, kaj kiujn personojn ni petu respondi.

*Dankon pro via helpo!*

La plej malbona afero estis la morto de Jules Verstraeten el Antverpena *La Verda Stelo*. Li estis Esperantisto ĝisoste, kiu dediĉis sian tutan vivon al Esperanto. Li donacis milojn kaj milojn da eŭroj al Esperanto (neŭtrala movado) kaj samtempe laboregis ĝis la plej lasta tago kiel simpla, modesta homo por ke revuoj kiel *Monato* kaj aliaj atingu la abonantaron. Se ĉielo ekzistas, li nun parolas kiel plej kara amiko kun Zamenhof.



SAT estas kleriga kaj instrua asocio, kiu elektis Esperanton kiel laborlingvon. Kaj per tio ni tuj venas al plej negativa punkto. Dum multaj jaroj deposed kiam mi agadas en SAT, mi devas, kun granda bedaŭro, konstati ke la ĝenerala esperantisto fakte apenaŭ aprezas, ke laborista kaj progresema asocio kia SAT estas, uzas la lingvon kiu ne estas ligita al iu nacio, do iun sennacian lingvon. Kun bedaŭro mi ĉiam konstatas, ke multaj homoj, ĉekape la loka E-grupeto el La Ĉaŭdefono (Civito aŭ io simila) facilanime kritikis SAT, sed apenaŭ scias kia laboro okazas en la asocio. Nu pigreco en penso kaj preno de informado estas libereco kiun ni devas respekti, ĉu?

Kiel dirite, ne estante Esperanto-asocio sed eduka kaj kleriga, la plej pozitiva afero estis la fondiĝo de nova eldonkoperativo ene de SAT. Kreita de grupo da junaj aktivuloj, kiuj decidis revivigi unu el la gravaj celoj de SAT, eldoni kvalitajn librojn, broŝurojn, ktp. Dua afero estas kreado de forta kaj laborpreta redakta skipo kiu malŝarĝos nian ĝeneralan sekretario pri la tasko de redaktado, kiam li, post longa sindediĉo al SAT povos ĝui emeritiĝon ek de 2009. Same grava estis la SAT-Kongreso, kiu ne, kiel iu profesoro deklaris, estis la lasta kongreso de SAT, sed la lasta okazinta ĝis nun, kie partoprenis pluraj junaj homoj, kiuj montris sin pretaj transpreni la torĉon de la maljunaj aktivuloj. La SAT-Kongreso en Parizo montris, ke la rolo de SAT certe ne jam finiĝis, sed male ke inter nun kaj 10 jaroj ni denove havos SAT, kiu ludos signifan rolon eble ne en Esperantio, sed certe en la mondo de la laboristaro, kiu pretos meti paŝon al lernado de universala lingvo kaj konscios pri la problemoj, kiujn la nuna tro kapitalista mondo alportas al la homaro.

**Jakvo Schram** (Belgio)

Prezidanto de la Plenumkomitato de SAT

La plej granda evento en 2007 okazis en Jokohamo: renkontiĝo kun poetoj japana kaj Esperantaj, al kiu japanoj invitis faman japanan poeton Tanikawa Shuntaro. La evento allogis kvindek da civitanoj de Jokohamo al UK kaj TV-teamon. Imitinde!

El mia vidpunkto, la plej nesukcesa estis la laboro de la Elekta Komisiono de UEA.



**Spomenka Štimec** (Kroatio)  
Sekretario de KEL

La plej pozitiva evento en 2007 estas la apero de *Beletra Almanako*, ĉar tio kio bremsas la eldonadon de esperantaj literaturaj verkoj ankaŭ bremsas la disvolviĝon de Esperanto. Pro la sama kialo, la malevento estas la malapero de *Fonto*. Esperanto ne plu vivos sen bunta kaj abunda literatura produktaĵo.

**Madeleine de Zilah** (Francio)  
Kunredaktisto de *La Gazeto*

### Pozitive

— La progreso de esperanto kadre de la Komuna Eŭropa Framo de Referenco, specife danke al la rolo de Kultura Centro Esperantista per la Lingvo-Testa Sistema de la Esperanta Civito.

— La akiro de jura personeco fare de TEJO, kaj ĝia bona financa situacio.

— La demokratiaj elektoj (tri listoj, entute 35 kandidatoj por 19 postenoj) kaj la starto de la dua mandato de la Senato de la Esperanta Civito, kun solena inaŭguro en la EU-parlamentejo en Bruselo.

— La unua Internacia Semajno de la Esperanto-Biblioteko (kun eventoj en Budapeŝto, Milano, Vieno).

— La demarŝoj de la Esperanta Civito ĉe Monda Socia Forumo, Kampanjo por la mortopuna moratorio kaj batalo kontraŭ grapolbomboj (en ĉi-lastaj partoprenas ankaŭ SAT).

### Negative

— La deklasingo de ILEI en ĝiaj rilatoj kun Unesko.

— La malforteco de TEJO rilate al la kontinueco de siaj gvidaj organoj.

— La manko de kandidatoj por la Komitato de UEA (nur 5 kandidatoj por 7 postenoj, malgraŭ kvinmilo da membroj) kaj la sovetieca elektosistemo por la Estraro de UEA.

— La strategio de UEA en Afriko, malgraŭ admonoj kaj protestoj de Hans Bakker al Renato Corsetti kaj Osmo Buller.

**Giorgio Silfer** (Eŭropo)

Konsulo de la Esperanta Civito

## Helpu militviktimojn en Afriko

Dum la pasinta jaro UEA plurfoje helpis viktimojn de la milito en Orienta Kongo. Temis pri homoj, kies familianoj estis mortigitaj de la ribela armeo kaj de la regula armeo, kies domoj estis bruligitaj, kiuj devis elmigri, ktp.

La milita situacio daŭras, kaj ni restas en kontakto kun la lokaj esperantistoj, inkluzive de tiuj, kiuj vivas en la "sendependa parto". En tiu landoparto esperantistoj kreis propran grupon kaj agas en la nestabila situacio, kaj eĉ aranĝas nun sian Zamenhofan feston.

Kompreneble la helpo-bezono estas grandega kaj ni sukcesas nur limigi nin al helpo al esperantistoj, kiuj iĝis viktimoj, aŭ al iliaj familioj. Estas krome alia praktika problemo. La neceso informiĝi pri la loka situacio kaj pri la veraj okazaĵoj, kiujn oni prezentas kunlige kun la peto, postulas amason da korespondado. Se serioza esperantisto volus helpi pri tio per sia tempo, li aŭ ŝi bonvolu kontakti min (✉ Via del Castello, 1 IT-00036 Palestrina, Italujo; ✉ renato.corsetti@esperanto.org).

Ĝenerala kaj pli facila helpo, por kiu mi nun ankaŭ alvokas, estas financa subteno de la agado per donaco al la *Konto Espero*.

La pagomanieroj estas en la paĝo 36-a de la Jarlibro de UEA. Mi kopias ĉi tie nur unu:

konto je la nomo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Banko MeesPierson, konto: 25 52 89 804, IBAN: NL27FTSB0255289804, BIC/SWIFT: FTSBNL2R.

Dankon nome de la senkulpaj viktimoj!

**Renato Corsetti**

# En Pollando, do nenie

## Komentario de Zbigniew Galor

Alfred Jarry — kunkreanto de la teatro de absurdo — komencis sian plej faman dramon per frazo: “La historio okazas en Pollando, do nenie”.

Pasis jam pli ol cent jaroj, kaj la frazo de *Ubu reĝo* konstante ŝajnas freŝa. Ĉar, ĉu oni povas tiom facile elpensi duan tian landon, kie ĉiutaga porcio da sensencaĵoj kaj absurdaj paradoksoj estus pli granda, ol povas aperi en eĉ la plej herooa imago? Fine, temas pri lando, kie naskiĝis Sławomir Mrożek kaj du ĝemelaj fratoj-politikistoj: Lech kaj Jarosław Kaczyński.

Ĉu la lando, kiu kuŝas nenie, povas esti antaŭvidebla kaj elkalkulebla? Ne, ne povas ekzisti tia. En ĝi ĉio povas okazi. Pro tio — ho, sankta paradokso — ĉion oni centprocente povas ... antaŭvidi. Ankaŭ la rezulton de la regado de la fratoj Lech kaj Jarosław Kaczyński, ekzemple, tiel, kiel en 2006 skribis Komitatano Z:

“Ne estus perdo ne plu aŭdi propagandon de registaro, kiu estas unu el la plej mallumaj en Eŭropo kaj honto por EU, kiu kokete lekcias al aliaj pri demokratio kaj esprimlibero. Esperige ja estas, ke poloj mem ekhontas pri siaj estroj, kies populareco jam multe falis. Se la registaro tamen ne stumblos je internaj kvereloj, ŝanco pervoĉdoni pli bonan aperos nur post kelkaj jaroj”.

*LOdE*, 2006, №12

En absurda lando “nenie” tiuj ĉi vortoj perdas sian pezon. Tio okazas ankaŭ sur fono de akra opinio de Wałęsa pri la fratoj, kiuj estis ankaŭ membroj de lia registaro. Li, antaŭ la balotado, publike priskribis J&L Kaczyński kiel ruinigantojn de ĉio, pri kio ili okupiĝas. Tiu imago rapide disvastiĝis inter la poloj kiel konvinko, ke la ĝemeloj rapide kompromitiĝos. Do ilia fino estis atendata — ekskluzive far iliaj apogantoj — jam en momento de ilia elekto.

La rimarko de Komitatano Z, pri ekhonto de poloj kaj pri postkelkajara ŝanĝo-ŝanco estas pli proksima al psikologio de kafejaj sorĉistoj ol al rigardo,

kiu rimarkas sociajn procezojn okazantajn en Pollando.

Dum la balotado en 2005 la partion PiS (Leĝo kaj Justeco — partio de la fratoj Kaczyński) unuavice apogis loĝantoj de pli malriĉaj, malgrandaj kaj mezaj urboj, malalte edukitaj homoj, ankaŭ sud-orientaj vilaĝaj partoj de Pollando. Al socia bazo de venkintoj apartenis ankaŭ dogme religia tutlanda katolika komunumo *Radio Maryja* gvidata far pastro Rydzyk — kun ĉefe emeritaj virinoj. Pro populareco de specifa kapkovrilo inter ili, ĉi tiu grupo ricevis la politikan nomon “mohajraj ĉapuloj” (moherowe berety).

Ankaŭ de aliaj lokoj en Pollando devenis homoj, pri kiuj oni skribas “viktimoj de transformado”. Iliajn bezonojn kaj atendojn antaŭ balotado plej bone rimarkis nur unu el la ĉefaj partioj — la partio de Kaczyński. Se iĝis akceptebla priridadi la konduton de ambaŭ fratoj-politikistoj, tiam primokadi ilian socian bazon atestis pri nekompreno de la fenomeno, kiu certigis potencon al ili kaj krome estis neetika.

Sen komenti pri la politika aktivado de fratoj Kaczyński, pro ilia regado certe Pollando por multaj eksterlandanoj kaj poloj iĝis pli konkreta. Aŭ almenaŭ iĝis pli facile trovebla.

**Jarosław Kaczyński:**  
“Nun, putino, ni!”

Sintenon al potenco de ambaŭ fratoj kaj iliaj apogantoj esprimas fama frazo de J. Kaczyński, kiu kritikante la socian kontrakton de la Ronda Tablo, substrekis, ke venis ilia vico ekhavi ŝtatan potencon kaj publike diris: “Nun, putino, ni!”

(Pole: “Teraz, k...a, my!” En gazararo ĝi funkcias ankaŭ kiel mallongigo: TKM. Nun, post rifuzo de la origina vulgarismo estas uzata kiel — TM.)

Por ke la fenomeno de PiS-registaro ne restu nur en la lando de absurdoj, plej bone estas referenci al la nuntempa pollanda historio. En ĝi duoble grava estis la jaro 1989. En tiu ĉi jaro okazis kunsidoj de la Ronda Tablo kaj falis la

Berlina Murego, kio estas traktata kiel komenco de pollanda transformado. Rezulte de la Ronda Tablo okazis paca transpreno de ŝtata potenco pere de la opozicia *Solidareco*, kies simbolo restis Lech Wałęsa. Post dek kvin jaroj (en la jaro sukcesa por la fratoj Kaczyński en la elektoj prezidenta kaj parlamenta) la procezo de transformado dividis polojn je profitantoj kaj malvenkintoj.

Teresa Trojańska la nefavoran, kaj eĉ malamikan rilaton de la fratoj Kaczyński al la Ronda Tablo klarigas en sia libro *My* (Ni) sur marĝeno de intervjuo kun J. Kaczyński. La kaŭzon ŝi trovas en la kontraŭdiro inter la grandegaj politikaj ambicioj de la ĝemeloj kaj ilia malgranda rolo dum la rondtablaĵoj kunveno, same — dum la strikoj en la jaro 1980 kaj la kreado de *Solidareco*.

Laŭ Kaczyński, la rondtabla kontrakto perdis sian historian signifon, ĉar baze de la kontrakto formiĝis nova elito, kiu konsistas el la malnova komunisma “nomenklature” kaj el nova “postsolidareca” grupo, kiuj akiris pozicion de posedantoj. Do, oni devas trairi al la sekva etapo. Tiucele oni bezonas “plirapidigon”, t.e.: rompon de malnovaj paktoj, malkomunismigon de Pollando; kaj malliberigon de generalo Jaruzelski kaj eĉ uzi kontraŭ li la plej altan punon, se evidentiĝus, ke li la militan staton enkondukis por sia propra uzo, ne kiel defendon kontraŭ la soveta interveno. Do, principe la samajn premisojn kiel PiS havis la unua partio kreita far fratoj Kaczyński — PC (Porozumienie Centrum — Interkonsento Centro), kiu rapide falis en la jaro 1993.

**Ne malhelpu, ni ĝuste nun regas**

Tre favora por la regado de PiS estis la tre bona stato de la pollanda ekonomio. Oni povas paradokse diri, ke la plej granda ekonomia atingo de la pasinta Kaczyński-registaro estas tio, ke ĝi ... tute ne okupiĝis pri la ekonomio. Ĝi profitis bonan konjunkturon. La pollanda ekonomio evoluis kun averaĝa 20%-a rapideco jare sur la ondo de tutmonda prospero. Tio estis rezulto i.a. de

pli fruaj investoj. Tamen PiS lasis la situacion nefavora. Tiu ĉi partio realigis i.a. la unuan post 1989 transakcion de reaĉeto de privatigita Banko de Medio- protektado: la ŝtato aĉetis tri kvaronojn de ĝiaj akcioj, uzante tiucele monon el la impostoj de la civitanoj.

La koalicio de PiS kun partioj antaŭe ne akceptataj en rolo de oficialaj kunlaborantoj (Samoobrona kaj LPR), elvokis grandan kritikon. La fratoj Kaczyński traktis la kritikajn voĉojn kiel personan atakon. La tiaman situacion, en kiu okazis grandaj kvereloj, kiujn mencias Komitatano Z, bone esprimas satira bildo: grandaj pordoj al salonego de parlamento kaj surskribo pendigita sur klinko: “Ne malhelpu — ni ĝuste nun regas”.

### Privatigado kaj pakto

Post la jaroj de privatigado poloj, laŭ diversaj opinionsondadoj, diris *ne* al la “forŝtelado de nacia havaĵo”. Esprimo de tiuj ĉi sintenoj renkontiĝis en politiko de PiS kun ideologio pri batalo kontraŭ la “pakto” kaj korupto. Pakto rilatis al: sekretaj servoj, politikistoj (speciale maldekstraj), elituloj de negoco, reprezentantoj de amaskomunikado, membroj de mafio. Dujara regado de PiS kaŭzis, en la realo, malrapidigon de privatigado, sed ne ĝian nuligon.

Malgraŭ tio, kompare kun intencoj de PO (Platforma Obywatelska — Civitana Partio), la politiko de fratoj Kaczyński ĉi-rilate prezentiĝas kiel sufiĉe zorgema. Kaj la partio ĵus venkinta en sia programo, titolita *Polska Obywatelska* (Civitana Pollando), anoncas privatigadon de ĉio ankoraŭ ebla; i.a. de hospitaloj kaj lernejoj. Temas ankaŭ pri elektro, akvo, gaso, komunikado kaj multaj aliaj branĉoj, traktataj en



Rezulte de la parlamentaj elektoj, kiuj okazis en Pollando en oktobro 2007, plej multe da voĉoj ricevis *Platforma Obywatelska* (Civitana Partio) kies gvidanto estas Donald Tusk: 41,51%. PiS, la partio de la fratoj Kaczyński, estas la dua: 32,11%. Du partioj, kiuj ankaŭ formis PiS-registaron, *Samoobrona* (Memdefendo) kaj LPR (Ligo de Polaj Familioj) ricevis 1,53% kaj 1,30% kaj ne eniris al la parlamento.

Voĉdonis 53,86% de ĉiuj poloj rajtigitaj baloti.

la civilizita mondo kiel komunaj havaĵoj, kiuj ne povas esti gvidataj per simpla ekonomia kalkulado kaj senleĝeco de libera merkato.

### Lech Kaczyński: “Forfikiĝu, maljunulo”

La ĉefaj socialaj kaj laboristaj problemoj ne estis solvitaj dum la lastaj du jaroj. La ekonomia kresko kaj la pli malgranda senlaboreco (13%) dum la regado de PiS ne plibonigis la situacion de la laborantaj homoj. Dum la lastaj jaroj la efikeco de laboro kreskis je 43%, sed salajroj je 7%. Dek jarojn antaŭe 4% de poloj vivis sub la vivminimumo. Hodiaŭ — ĉ. 13%. Ĉiu oka homo vivas en ekstrema malriĉeco, kaj 60% sub la sociala minimumo.

Plimalgrandiĝo de senlaboreco estas ne merito de la registaro de PiS, sed rezulto de amasa elmigrado. Tiu ĉi registaro okupiĝis ne pri plej gravaj sociaj problemoj sed pri politika revizio, malkomunismigo, pliakrigo de sinteno kontraŭ abortigo. La estraro uzis nur socialan retorikon, kaŭzis plifortigon de premo kontraŭ laboristoj kaj sindikatanoj. Spertis tion i.a. strikantaj kuracistoj, instruistoj, flegistinoj.

Vortojn “Forfikiĝu, maljunulo” diris Lech Kaczyński en 2002 post publika renkontiĝo en Varsovio, kiam unu el partoprenantoj kelkfoje ripetis al li, ke politikistoj forkuras de partio al la partio, “kiel ratoj”. Jam kiel prezidanto de Pollando la saman sintenon, sed pli ĝentilforme, li prezentis al strikantaj antaŭ lia sidejo reprezentantoj de diversaj profesioj, kiuj postulis plialtigon de siaj salajroj.

### Demokratio kaj ekstera politiko

Tiuj poloj, kiuj en la demokratio (post 1989) estis malsataj, ekaŭdis de PiS, ke estos pli malmulte da demokratio, sed pli multe da pano. Kaj multaj elektis tion. Sed evidentiĝis, ke ideo de “solidareca ŝtato” (t.e.: ŝtato helpanta al

La ĝemeloj-gvidantoj iĝis objekto de pluraj ŝercoj kaj karikaturaj, ne nur interne de gazetoj, sed eĉ kovrilpaĝe. Vidu, ekzemple, la revuon *Wprost*.

malfortaj kaj malriĉaj) apartenas nur al “politika novparolo”, kiu permesis turni la socian atenton de la transpreno de sekvaj instrumentoj de potenco (tribunaloj, kontrolaj instancoj) far PiS kaj de limigado de liberecoj sindikataj kaj civitanaj (ekzemple, malpermeso por marŝo de toleremo).

Nun preskaŭ 60% de poloj protestas kontraŭ la usonaj “rakedaj instalaĵoj” kaj militaj bazoj, same kiel kontraŭ engaĝiĝo en “malpuraj” militoj en Irako kaj Afganiŝtano.

Genuanta pozicio antaŭ Usono. Rekompensanta minusvaloron — malsana supereco antaŭ Rusio. Blinda amo al elektita, konservema flanko de pola historio, al naciaj malvenkoj kaj malsukcesoj. Timo kontraŭ malfermita Eŭropo. Nekapableco komuniki kun “la aliaj”, nur — kun “la samaj”. Revivigitaj stereotipoj de “polo-katoliko” kaj “patrino-polino”.

Danke al PiS plifortiĝis malnovaj polaj kompleksoj. Denove oni povis vidi, ke — laŭ certa absurda esprimo — la ĉerkoj (de Piłsudski kaj Dmowski — simboloj de sendependeco kaj naciismo) regas Pollandon.

La ampleksiĝo de *La Ondo* donis al ni eblon restrukturi la magazinon. Sen damaĝi la primovadan sekcion ni povas nun aperigi pli longajn artikolojn kaj komentariojn. En la februara kajero komenciĝos plia nova rubriko, en kiu ni prezentos dek librojn, kiuj havis grandan influon en Esperantujo.

Ni volas scii, kion vi pensas pri la gazeto. Tiucele kun la decembra kajero de *La Ondo* estis dissendita demando, kiu estas plenebla ankaŭ en nia retejo. Post unu monato ni resumos la rezulton. Bonvolu sendi respondojn, poŝte aŭ rete, por ke ankaŭ via opinio estu konsiderita.

Ĉi tiu jaro estas kvazaŭ sojlo por la jaro 2009, en kiu *La Ondo* centjariĝos. Ni esperas, ke vi restos kun ni antaŭ, dum, kaj post la jubileado.

Gajan Kristnaskon!  
Bonan jaron 2008!

LODE



# Neatenditaj trajtoj

*Koreaj studentoj el la vidpunkto de germana instruistino*

**de Birke Dockhorn**

Mi verŝajne ne erare pensas, ke multaj havas bildon pri aziaj studentoj en la kapo, kiu montras ilin ĉefe studemaj, afablaj, trankvilaj, ridetemaj, modestaj, retenemaj kaj nediskutemaj.

Dum tri kaj duona jaroj kiel instruistino por la germana en la Hankuk-Universitato por Fremdaj Lingvoj de Seulo mi havis tempon observi la konduton de miaj koreaj studentoj, kaj pli ol unu fojon mi tre surpriziĝis kaj devis revizii miajn antaŭajn imagojn. Ĉi tie mi ŝatus prezenti kelkajn impresojn.

Pravas, ke la plej multaj el miaj koreaj studentoj estas afablaj. Ili estas edukitaj al nepra salutado, al ĝentileco kaj al estimo rilate al la instruisto. Kompare al germanaj studentoj ili

malpli ofte rekte plendas pri io. Ili ankaŭ malofte diskutadas kun mi. Tiu nediskutemo fakte ofte gvidas en la klasĉambro al la fifamaj koŝmaraj situacioj, kiujn ĉiu lingvoinstruisto timas pri aziaj studentoj: Starigu demandon antaŭ la tuta klaso kaj ĉiuj silente rigardas vin; kelkaj afable, kelkaj timeme, kelkaj tute seninterese. Por la instruisto tio estas nekredeble pena, ĉar bona lingvoinstruado ja dependas de vigla klasĉambra etoso kaj de certagrada parolemo de la studentoj.

Indas demandi pri la kialoj de tiu retenemo. Unu ne subtaksenda kialo estas, ke la studentoj tre ofte simple ne komprenas la demandon kaj timas diri ion ajn en la germana. Tio montriĝas, kiam mi rekte vokas la nomojn de la

studentoj. Finfine, post longa recertiĝo ĉe la najbaroj pri la enhavo de la demando, mi ricevas mian respondon, kvankam ankoraŭ malvolontan kaj necertan. Ni rigardu tion ankoraŭ iom pli profunde: Ili timas diri ion malĝustan antaŭ mi kaj antaŭ aliaj studentoj, kiuj eble estas pli junaj. Je tiu punkto la aĝo envolviĝas. Mi ja laboras en konfuceanisma lando. La sama pensmaniero, en kiu radikas la estimo de la instruisto, nome de la pli aĝa, kiu neniam eraras, tiu sama pensmaniero diras, ke oni mem ne faru erarojn antaŭ la malpli aĝa. Kaptilo por la eksterlanda lingvoinstruisto, kiu volas instigi al libera sinesprimado kaj al la kompreno, ke eraroj necesas en la lernoproceso.

Tria kialo estas socia. Mi povas erari, sed laŭ mia impresoj la koreaj lernantoj ne lernas esprimi sian propran opinion. Ili ankaŭ ne interesiĝas pri aktualaj temoj, ili eĉ ne provas starigi propran opinion kaj esprimi ĝin. Tio ofte surprizas min, ĉar mi preskaŭ ĉiam havas opinion, se mi estas bone informita pri iu temo (kaj ankaŭ, se ne).

Esprimo de opinioj kaj diskutemo en koreaj klasĉambroj do ofte tre dependas de la klaso, en kiu oni instruas: la aĝo de la gestudentoj, la fakto, kiel bone ili konas unu la alian, ilia lingvonivelo. Se oni kiel instruisto komprenas tion, oni almenaŭ ne bezonas dubi pri la propraj kapabloj.

Ekzistas tamen situacioj, en kiuj koreaj studentoj diskutadas kaj ankaŭ havas tre klaran opinion, kiun esprimi ili ne hezitas. Temas pri la noto en la fino de la semestro. Ili ofte faras ion,





kion mi neniam atendus kaj kio al mi por ĉiam detruis la bildon de la retene-ma kaj modesta korea studento: ili petegas pli bonan noton. Koreaj kaj eksterlandaj instruistoj ricevas regule post la fino de la semestro telefonalkojn kaj retmesaĝojn, en kiuj gestudentoj insistas pri pli bona noto ol tiu, kiun ili ricevis. La plej bona reago al tio estas afabla klarigo pri la kialo por la noto kaj cetera ignoro de pliaj petegoj.

Al tio rilatas alia bildo, kiun oni kutime havas pri koreaj studentoj kaj kiu detruigis por mi ĉi tie: la studemo.

Oni ne vere povas diri, ke studentoj ĉi tie ne estas diligentaj. Tio estus tro ĝenerala kaj pro tio malprava. Pli korekte mi ŝatus vortigi: Plejmulto el miaj studentoj de la germana laŭ mia opinio ne estas diligentaj ĝuste pri sia studfako. Kaj oni ne miksu diligenton kaj fortostreĉon.

Inter miaj studentoj troviĝas multaj, kiuj pri la germana ne tre bone laboras. Ili eble interesiĝas pri la enhavo de la lecionoj, kaj ili ja tre interesiĝas pri bona noto en la fino, sed multaj havas imagon, kiel kaj kiom oni devas labori por akiri tian bonan rezulton. Por akiri bonan noton laŭ mia kompreno necesas kunlaborado jam dum la lecionoj mem. Multaj studentoj tamen pensas, ke simpla ĉeesto kaj aŭskultado en la leciono sen aktiva kunlaboro sufiĉas (jen ni revenas al la

problemo, kiun mi menciis antaŭe pri sinesprimado en la klasĉambro). Krome necesas regule fari hejmtaskojn kaj ripeti la lernitajn aferojn hejme. Tiu farado de hejmtaskoj kaj lernado hejme laŭ mia impresio en plej multaj okazoj simple ne okazas.

Kompreneble indas rigardi pli zorge la kialojn ankaŭ por tio. Entute en Koreujo oni dum la studado plej ofte ne prepariĝas al laboro, sed studas por ricevi universitatan diplomon — prefere de bona universitato. Krome multaj studentoj preferus studi la anglan aŭ ion alian anstataŭ la germanan. Aldone la germana estas tre fora lingvo, kaj kontaktoj al germanoj kaj sekve al la eblo praktiki la lingvon estas tre maloftaj. Post la studado estas malfacile trovi laborlokon per la germana. Do, de kie venu la vera motiviĝo? Kelkaj, kiuj iam volos veturi al germanlingva lando, havas ĝin. Certagradan motiviĝon donas ankaŭ la noto, se oni ne decidas mistaksi sin mem kaj persekuti la instruiston pri pli bona noto. Fakte multaj gestudentoj lernegas por la ekzamenoj, kiuj okazas meze kaj fine de la semestro. Sed ili komencas lernegi du tagojn antaŭe. Mankas al ili taŭgaj labor teknikoj kaj la ĝusta sinteno al studado. “Diligente studi” ja ofte signifas “longe studi” aŭ “fortostreĉe studi”, ne nepre “efike studi”.

Antaŭ kelkaj tagoj mi ekzercis en la klaso la strukturon “Kiam mi ....;

tiam mi ..”. Ofte venis la frazo “Kiam mi estis en la lernejo, tiam mi ĉiam estis lacega”. Tio diras multon. Jam dum la lerneja tempo nepras, ke infanoj iru al privataj lernejoj por ripeti kaj antaŭlerni aferojn de la klasĉambro. Tiu kromlernado ne nur laciigas koreajn lernantojn, sed ankaŭ pigrigas ilin, ĉar ili jam konas la aferojn poste en la lernejo. Krome ĝi forprenas de ili la kapablon mem decidi, kion ili devas lerni kaj kiumaniere atingi tiun celon. Alia kromefiko estas, ke post tiom da malfacilegaj jaroj finfine almenaŭ en la unua studojaro la studentoj volas vivi, ne denove suferi.

Sed kiel ajn mi analizas kaj komprenemas — fakto estas, ke al miaj gestudentoj mankas interesiĝo pri enhavoj, kaj taŭgaj labor teknikoj kaj konscio por efike studi. Mi evidente havas tute diversajn alirojn kaj ideojn pri studado. Fine oni povus ja demandi, kial tamen indas por mi instrui ĉi tie, se tiom da bonaj bildoj pri la alia kulturo disfalis? Nu, mi ŝatus malkonstrui antaŭjuĝojn pozitivajn kaj negativajn. Ĉiam indas rigardi iom pli profunde malantaŭ la unuan impreson. Kaj antaŭ ĉio en la ĉiutago tamen la afabla flanko de koreaj studentoj plej rimarkeblas. Estas plezuro renkonti ilin, kaj kun iom da komprenemo pri ilia situacio oni sukcesas ellogi aliajn neatenditajn flankojn: ilian kreemon kaj humuron.

---

**Birke Dockhorn** studis koreologion, la anglan lingvon, germanan lingvistikon kaj instruadon de la germana al eksterlandanoj en la Humboldt-Universitato de Berlino. 1994 ĝis 1995 ŝi intense lernis la korean lingvon en la Centro por Fremdaj Lingvoj de la Yonsei-Universitato.

En 2000 ŝi magistriĝis en Berlino kaj ekde 2001 laboris en la koreologia sekcio de la Universitato de Tübingen. En 2003 ŝi eklaboris en la Universitato de Aŭgsburgo en la sekcio “Germana kiel fremda lingvo”, interalie ŝi tie gvidis seminarion pri Esperanto.

En 2004 ŝi venis al Koreujo kaj eklaboris en la Hankuk-Universitato pri fremdaj lingvoj. Ŝi instruas tie la germanan lingvon al gestudentoj de ĉiuj jaroj, krome en la instituto por interpretado kaj tradukado.



## Barlaston: kio okazas?

Aperis lastatempe en la esperanta gazetaro kaj aliloke raportoj pri la sidejo de Esperanto-Asocio de Britio en Barlaston, sude de la mezangla urbo Stoke-on-Trent. La sidejo, konsistanta ĉefe el oficejo kaj el la esperanta Biblioteko Butler, estas malfermita de Renato Corsetti, tiama UEA-prezidanto, en septembro 2002. Ĝi situas sur la tereno de Wedgwood Memorial College, fondita antaŭ pli ol 60 jaroj, en kiu jam de pli ol 40 jaroj okazas esperantaj kursoj kaj seminarioj.

Ĉi-jare, kiam la estrino de la kolegio elposteniĝis, la magistrato de la urbo Stoke-on-Trent, al kiu apartenas la tereno, decidis — malgraŭ promesoj — ne tuj varbi novan estron. Anstataŭe, ĝi anoncis esploron pri la estonteco de la kolegio. Uzantoj de la kolegio, inkluzive de esperantistoj, timis, ke la konsilantaro intencas vendi la teronon (certe altvaloran) kaj ĉesigi ĉian tiean edukan agadon.

Substrekendas, ke la magistrato neniam anoncis, ke ĝi intencas fermi la kolegion. Raportoj, kiuj sugestas, ke la kolegio fermiĝos, ke Esperanto-Asocio de Britio senhejmiĝos, malveras. Aliflanke ne eblas nei, ke EAB trairas necertan periodon — tamen periodon, dum kiu, kunlabore kun aliaj interesatoj, ĝi multflanke aktivis por atentigi pri la plusoj de la nuna kolegio kaj por proponi strategiojn, per kiuj la estonteco de la kolegio — kaj kune tiu de la sidejo de EAB — estos garantiata.

La konsilantaro publikigos sian raporton verŝajne en januaro. Intertempe vanas provi prognozi la konkludojn; cetere senutilas riproĉi al EAB, ke ĝi estus povinta pli fari (eĉ ke ĝi ne devintus translokiĝi al Barlaston). Direblas

tamen, ke tiuj, kiuj intime enplektiĝis en la diskutoj kaj debatoj pri la kolegio, ne estas tute senesperaj: povas esti, ke fine eblos kompromiso, kiu permesos la pluan ekziston de la kolegio.

EAB havas 99-jaran lukontrakton kun la magistrato de la urbo. Eĉ se — kaj jen granda se-o — la kolegio estus fermita, la magistrato estus devigita aŭ trovi por EAB alian hejmon, aŭ je granda prezo kompensi ĝin. EAB ne estos en financa danĝero pro la afero.

**Paul Gubbins, John Wells**

## Honore al pioniroj

17 nov 2007 okazis inaŭguro de du memortabuloj honore al Esperanto-pioniroj en Villingen-Schwenningen, Nigra Arbaro: Wilhelm Blumenstock (Niedere Straße 7) kaj Karl Kratt (Zinsergasse 14).

La domoj troviĝas en la centro de la urboparto Villingen, kaj multaj piedirantoj povas aŭ pli bone nepre devas vidi ilin preterpasante la domojn.

Wilhelm Blumenstock fondis la unuan Esperanto-grupon en Villingen en decembro 1906 kune kun J. Zinser, H. Bürstner kaj W. Lieberknecht. Wilhelm Blumenstock tiam estis 17-jaraĝa. Poste li fariĝis horloĝisto kaj transprenis la horloĝvendejon de siaj gepatroj. Hodiaŭ lia filino estras la horloĝvendejon. Tial en 2006 la Esperanto-grupo Villingen-Schwenningen celebris la 100-jariĝon de la unua Esperanto-grupo.

Karl Kratt (1910–2004) fariĝis en 1930 membro de la Esperanto-grupo de Villingen. Post la dua mondmilito li refondis en 1946 la Esperanto-grupon en Villingen kun la nomo *Progreso* kaj fondis alian Esperanto-grupon en Schwenningen. Tiam la du urboj ankoraŭ ne unuiĝis. En la 1950aj jaroj tiuj du grupoj ĉesis. Karl Kratt estis il-faristo. Li kolektis ĉ. mil serurojn kaj multajn horloĝojn.

En 1980 pastro Bernhard Eichkorn kaj Josef Schiffer denove fondis Esperanto-grupon kun la nomo “Esperanto-Gruppe Villingen-Schwenningen”. Ĝis hodiaŭ Josef Schiffer estas la prezidanto de tiu Esperanto-grupo.

**Josef Schiffer**



(Fotis Josef Schiffer)

## Projektaĵo ĵurnalista asocio

Litova Ĵurnalista Esperantista Asocio (LĴEA) ricevis subvencion de Litova Ĵurnalista Asocio 5000 lidojn (ĉ. €1450). Per tiu mono LĴEA efektivigos kvar projektojn. Estas fondita premio de la unua litova esperantisto Aleksandras Dambrauskas pro popularigo de Esperanto en litovaj amaskomunikiloj (1000 lidoj). La unua premio estos enmanigita dum Zamenhof-Tagoj 2008. Estas anoncita konkurso por la plej bonaj artikoloj en *Litova stelo* dum 2008 — estos premiitaj tri plej bonaj kontribuoj (ĉiu po 500–700 lidoj). En aprilo kaj en oktobro 2008 estos organizataj du perfektigaj seminarioj por esperantistoj-ĵurnalistoj.

La ĉefa projekto de LĴEA, Litova Ĵurnalista Asocio kaj Litova Esperanto-Asocio estas organizado de mondkongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj fine de majo 2008 en Vilno.

**Povilas Jegorovas**

## Historio sur diskoj

Haveblas ĉe Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio dblank.e.gil@snafu.de) sur diskoj (kiel fotoĵoj) jenaj revuoj, kiuj aperis en GDR:

1. La kompletaj jarkolektoj de la organo de Esperanto-Asocio en GDR (GDREA) *der esperantist* (1965–1990, sume 164 A5-formataj numeroj) kun diversaj indeksoj ebligantaj la materialserĉon. La revueto estas parte esperantlingva, parte germana.

2. La GDR-eldonoj de la organo de MEM, *Paco* (1966–1989, 24 luksaj A4 kajeroj), komplete esperantlingva.

**Detlev Blanke**

16 nov 2007 forpasis

**Szilveszter Ördögh (1948–2007)**

hungara verkisto, laŭreato de la Premio Attila József, ĝenerala sekretario de la societo *21a Jarcento*, ĉefredaktoro de kultura revuo *Tekintet*, en kiu li aperigis plurcent verkojn tradukitajn el la Esperanta literaturo.

20 nov 2007 forpasis

**Ada Csiszár (1930–2007)**

Esperantisto de 1966, sekretario de Esperantlingva Verkista Asocio 1983–89, fondinto (en 1991) kaj prezidantino de la Amika Societo de d-ro Kálmán Kalocsay, kunaŭtoro (kun Kalocsay) de *Domfabriko*. Ŝi gardis la materialan kaj spiritan heredaĵon de Kalocsay, samtempe disponigante ĝin al la granda publiko.

*Ni funebros kaj kondolencas.*



## Unio kun Brandenburgo

Post la morto de Albreĥto (1568) la situacio en Pruslando komplikiĝis. Psike malsana filo de Albreĥto — Albreĥto Frederiko (1553–1618) — ne kapablis regi la landon. Li vivis solece en la kastelo Fishchausen. Kun la konsento de la pollanda reĝo, princoj-elektantoj Brandenburgaj el la dinastio Hohenzollern estis regentoj de Pruslando. Post la morto de Albreĥto Frederiko en 1618 ĉesis la Pruslanda branĉo de Hohenzollern-oj. Tiutempa regento, Johann Sigismund (1572–1619), la edzo de la plej aĝa filino de la princo, ricevis la princan titolon de la unuigita ŝtato Brandenburg-Pruslando.

La kunigita ŝtato enhavis Brandenburgan princlandon, gravan ŝtaton de la Sankta Roma Imperio, kaj Prusan princlandon, vasalon de la pola reĝo. La ŝtatestro preferis nomi sin princo-elektanto (Kurfürsten), la loĝantaro de Pruslando konsideris la polan reĝon supera instanco.

Por la nova ŝtato gravis liberiĝi el la pola dependeco. Tion sukcesis atingi en 1657 granda princo-elektanto Frederiko-Vilhelmo. La lerta politikisto eluzis la polan-svedan konflikton. Ricevinte subtenon de Svedujo, li proklamis suverenecon de Pruslando. Malfortiĝinta dum militoj Pollando devis akcepti tion. Tiamaniere Brandenburga-Pruslanda ŝtato iĝis plene unueca kaj sendependa, kvankam ambaŭ partojn disigis pola teritorio.

## Granda ruslanda ambasado

En 1695 la armeo de la ruslanda caro Petro I (1672–1725) kaptis turkan fortikaĵon Azov. Petro decidis direkti ambasadon al la Rom-Germana imperiestro, reĝoj de Britio kaj Danlando, papo, princo de Brandenburgo, kaj al Venecia respubliko. La celo de Petro estis viziti multajn eŭropajn landojn por akiri novajn konojn pri ŝipkonstruado, navigado, kaj artilerio. La oficiala celo esprimita en lia ukazo estis “konfirmo de malnovaj amikecoj kaj amoj, komuna por la tuta kristana mondo malfortigo de la malamikoj de kristanismo, turka sultano, krimea ĥano kun ĉiuj muzulmanaj hordoj kaj daŭra pliigo de la kristana hegemonio”. La caro vojaĝis inkognite, kio ebligis libere moviĝi, kontakti privatajn, senbare lerni. Aliflanke, li povis senprotokole interparoli kun ŝtatestroj kaj diskuti politikajn problemojn. La vojo pasis tra Livonio, Kurlando kaj Pruslando, evitante Pollandon, kie tiutempe estis senreĝeco.

## Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (10)

### De Halina Gorecka

La Brandenburga princo Frederiko III (1657–1713) ricevis peton nur pri transiro de lia lando, sed Frederiko decidis persone saluti la ambasadon en Kenigsbergo. Li sendis komisiiton al Memel por renkonti la ambasadon. Malgraŭ bona preparo la renkonto pasis tute alimaniere. Petro kun kelkaj proksimumoj surŝipiĝis en Libava kaj mare venis al la pruslanda haveno Pillau (nun Baltijsk).

17 maj 1697 Petro I venis al Kenigsbergo kaj ekloĝis en Kneiphoff. La princo interparolis kun Petro inter kvar okuloj. Atendante la ambasadon, kiu vojaĝis surtere, Petro ne deziris perdi la tempon kaj komencis lerni artilerion; lia instruisto, kolonelo von Sternfeld, donis ateston al Petro Miĥajlov (sub tiu nomo la caro vojaĝis), ke “li, en mallonga tempo, por ĉies miro, montris tiajn sukcesojn kaj akiris tiajn konojn, ke ĉie li estos rekonita kiel akurata, singarda, lerta, kuraĝa kaj aŭdaca pafmajstro”.

La veninta ambasado estis lukse akceptita. Uzante la okazon, Frederiko deziris defendkontrakti kun Ruslando, sed Petro rezignis la proponon timante ŝanĝi rilatojn inter Ruslando kaj eŭropaj landoj antaŭ la fino de la milito kontraŭ Turkio. Estis aranĝita amikeckontrakto pri libera komercado ambaŭflanka, pri permeso por rusoj veturantaj studcele al Germanio trapasi la teritorion de la princo, kaj pri permeso por la komercistoj de la princo vojaĝi tra Ruslando al Persujo kaj Ĉinujo. Krome, Petro buŝe konsentis subteni pretendojn de Frederiko je reĝa krono.

Petro pasigis en Pruslando pli da tempo ol planite, atendante la elekton de nova pola reĝo. Ricevinte bonajn novaĵojn el Pollando (venkis la partio de saksa princo Frederiko Augusto) li pluvojaĝis. Post la reveno de la Granda Ambasado, sur la insulo Kotlin, apud Peterburgo, komenciĝis konstruado de fortikaĵoj. La projekto, persone konfirmata de la caro, estis farita laŭ la modelo de la fortikaĵo Friedrichsburg, kiun Petro ekzamenis apud Kenigsbergo. En la jaro de la 300a datreveno de la ambasado unu el la kaliningradaj stratoj ricevis la nomon “Kajo de Petro la Granda”. En la renovigita Reĝa Pordego estas funkciigita ekspozicio pri tiu evento.



Reĝo Frederiko I

## Prusa reĝlando

Sub la regado de Frederiko III la Brandenburga-Prusa princlando aneksis aliajn germanajn landetojn. La teritorio de la princlando superis kelkajn reĝlandojn. Titolo de princo-elektanto ŝajnis nesufiĉa al Frederiko III. Por promocii sian statuson li ekrlatis kun la imperiestro Leopoldo, kies filo Karlo celis la hispanan tronon. Por kontraŭstari alian pretendanton li bezonis soldatojn. Ĝuste soldatoj iĝis necesa pago por la aspirata titolo. La nova reĝo estis kronita en la Kenigsberga kastelo 18 jan 1701 kiel Frederiko I, reĝo en Pruslando.

Amasaj malsanoj estis oftaj. Precipe kruela estis la pesto, kiu venis en 1700 kaj daŭris dek jarojn, forpeninte la vivojn de preskaŭ triono de la loĝantaro. La dua reĝo Frederiko-Vilhelmo (1688–1740) unuavice funkciigis internan migradon: pli bonstataj regionoj “delegis” siajn loĝantojn al Insterburg, Tilsit, Ragnit. Poste venis migrantoj el aliaj regionoj germanaj.

La plej konata estis la kazo de Salcburgo. Arkiepiskopo de Salcburgo 31 okt 1731 dekretis al ĉiuj luteranoj pli ol 12-jaraĝaj dum ok tagoj forlasi la landon. En la responda dekreto 2 feb 1732 la pruslanda reĝo deklaris la persekutatojn siaj ŝtatanoj kaj invitis ilin ekloĝi en Pruslando. Migrantoj ricevis teron, brutojn kaj laborilojn. Gumbinnen iĝis centro de migrado; eĉ estis diskutita la ideo nomi ĝin Nov-Salcburgo.

Daŭrigota

# Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (5)

**mandarin/o.** Frukto de mandarin-ujo, speco de oranĝeto, tre suka kaj dolĉa, kun bonodora, maldika, facile forigebla ŝelo. **mandarin/uj/o, mandarin/arb/o.** Arbetu, kies frukto estas mandarino. (*Citrus reticulata*.)

**mang/o.** Frukto de mango, maturstadio flava aŭ oranĝa, kun tre suka, dolĉa, aroma, flava karno kaj kun granda plata kerno. **mang/uj/o, mang/arb/o.** Tropika fruktarbo indiĝena en suda Azio, kies frukto estas mango. (*Mangifera indica*.)

**maniok/o.** Tropika arbusto aŭ arbo origine el Sud-Ameriko, kun tuberaj ameloriĉaj radikoj, kiuj estas manĝeblaj post prilaboro: *dolĉa manioko; maldolĉa manioko; tapioko estas farita el manioko.* (*Manihot esculenta*.)

**mate/o 1** Arbo maksimume dek metrojn alta, kies ledecaj folioj, sekigitaj aŭ rostitaj, estas uzataj por infuzaĵoj. (*Ilex paraguayensis*.) **2** Sekigitaj aŭ rostitaj folioj de mateo *1*. **3** Infuzaĵo el mateo *2*.

[**Noto.** La personan nomon *Mateo*, kaj la tutan problemon pri traktado de personaj nomoj, la Akademio prokrastis por posta konsidero.]

**matric/o 1** Gravurita peco aŭ muldilo, tenanta negativan reliefan formon, uzata por krei (per stampado aŭ fandado) gramofonajn diskojn, prestipojn, medalojn, monerojn, aŭtoplatojn aŭ aliajn objektojn kun reliefa surfaco. **2** Tabelo el samspecaj matematikaj objektoj (ekz. nombroj): *matrico el 200 horizontaloj kaj 300 vertikalaj; kvadrata matrico; adicio/multipliko de matricoj.*

**melongen/o 1** Neligneca kreskaĵo kun dentaj folioj, violetaj floroj kaj grandaj malhele violaj longformaj fruktoj (ekzistas specoj aliformaj kaj alikoloraj). (*Solanum melongena*.) **2** Frukto de melongeno *1*.

**menstru/i.** Ellasi sangon el la utero dum kelkaj tagoj proksimume unu fojon en ĉiu monato: *ŝi regule menstruas.* **menstru/o.** Menstrua sangelfluo, monaĵo: *kiam estis via lasta menstruoj?; ŝiaj menstruoj estas neregulaj; menstruoj okazas de la seksmaturiĝo ĝis la definitiva menstruĉeso.*

**mesaĝ/o 1** Parola aŭ skriba informo sendata al iu: *nuntempe homoj sendas mesaĝojn tra la Interreto.* **2** (figure) Esenca ideo, kiun celas transdoni teksto, rakonto, filmo, agado k.s.: *kio estas la mesaĝo de la Biblio por la nuntempa*

# AdE

*homo?; tiu filmo enhavas politikan mesaĝon; la malbona traduko fuŝis la mesaĝon de la aŭtoro.* **mesaĝ/i.** Sendi per mesaĝo: *li mesaĝis la novaĵon al mi; ili ofte mesaĝas inter si; per poŝtelefono oni povas mesaĝi tre rapide.*

**minuskl/o.** Malĉeflitero, etlitero. Tia litervarianto (en kelkaj alfabetaj skribosistemoj), kiu estas uzata en ĉiuj ordinaraj okazoj (en kiuj oni ne uzas majusklojn), ekz. a, b, c, ĉ. (La malo estas majusklo.) **minuskl/a 1** Skribita per minusklo(j); rilata al minusklo(j). **2** (en paleografio kaj tipografio, pri signaro) Tia, ke ne ĉiu signobildo estas skribebla inter du paralelaj horizontaloj: *minuskla signaro; minusklaj ciferoj; minuskla skribo Karolida.*

**miraĝ/o 1** Optika fenomeno kaŭzanta tian iluzion, ke malproksimaj objektoj ŝajnas proksimaj pro devojigo de lumo tra iranta varman aertavolon: *la ŝajna lago en la dezerto estis miraĝo.* **2** (figure) Alloga iluzio.

**modem/o.** Aparato, kiu transformas ciferecan signalon (ekz. de komputilo) en analogan aŭ inverse, por transsendo per telefona reto, radio, elektra reto aŭ simile: *konekti komputilon al la Interreto per modemo.*

**muld/i 1** Fari objekton enpremante aŭ fluigante molan substancon en ujon, kiu havas la deziratan formon: *muldi medalon; muldi plastajn telerojn;* (figure) *muldi pensmanieron.* **2** Reprodukti la formon de io per mola substanco, kiun oni poste malmoligas kiel ujon (por ebligi muldi *1*): *muldi per gipso vizaĝon; muldi reliefon.*

**nan/o 1** Homo, kiu estas multe malpli alta ol normale (por la aĝo). **2** Besto aŭ vegetaĵo, kiu estas multe malpli granda ol normale. **nan/a 1** Rilata al nano. **2** Tre malalta/malgranda.

**omaĝ/o.** Esprimo aŭ manifestaĵo de honora respekto al iu: *la ekspozicio estas omaĝo al la ĵus mortinta artisto.*

**omaĝ/i.** Esprimi honoran respekton: *omaĝi al Zamenhof.*

**organik/a.** Rilata al la karbonkombinaĵoj: *organika ĥemio.* **ne/organik/a.** Rilata al ĉiuj substancoj aliaj ol la karbonkombinaĵoj: *neorganika ĥemio.*

**orgasm/o.** Pinto de seksa ekscitiĝo, karakterizata de fortaj sentoj de plezuro, de serio da muskolaj spasmoj, kaj ĉe viroj ordinare de spermelĵeto.

**pankreat/o.** Granda ventra glando (malantaŭ la stomako), kiu sekrecias senkoloran sukcon helpantan al digesto, kaj kiu ankaŭ produktas hormonojn, interalie insulinon.

**paprik/o.** Spico (ruĝa, bruna aŭ flava) preparata el sekigita kaj pulvorigita frukto de iuj specoj de kapsiko: *hungara papriko; dolĉa papriko; akra papriko.*

**pavilon/o.** Aparte staranta (ofte ornamita) konstruaĵo (aŭ tendo) en korto aŭ ĝardeno (ofte por uzo dum nur limigita tempo): *ekspozicia pavilono; muzikpavilono; pavilono de tetrinkado.*

**penicilin/o.** Antibiotiko origine ekstraktata el iuj specoj de penikŝimo, nun sintezata.

**penis/o.** Ekstera vira organo, per kiu homoj kaj bestoj urinas kaj seksumas.

**periskop/o.** Rigardaparato kun speguloj aranĝitaj en tubo tiel, ke la rigardanto povas vidi la ĉirkaŭaĵon restante sub aŭ malantaŭ ŝirmaĵo: *periskopo de submarŝipo.*

**persvad/i.** Igi iun iel agi per (insista) argumentado, petegado k.s.: *ŝi persvadis min kuniri, kvankam mi ne vere volis.*

**petal/o.** Iu el la aro de delikataj, koloraj, foliecaj partoj de floro, kiuj kune formas la korolon de la floro, kaj ekster kiuj troviĝas la kalikfolioj.

**pic/o.** Italdevena manĝaĵo el platigita (ronda) pastopeco kun surmetitaj tomatoj, fromaĝo kaj aliaj ingrediencoj, bakata en forno: *pico kun anĉovoj; pico kun ŝinko; funga pico; kvarsezona pico.* **pic/ej/o.** Restoracio aŭ simila ejo, kiu ĉefe vendas picojn.

**piĵam/o.** Dormovesto el komforte vastaj jako kaj pantalono (ordinare en du pecoj, sed iafoje en unu kuna peco).

**piknik/o.** Senceremonia manĝo plenaera, en la naturo, dum ekskurso k.s. **piknik/i.** Fari piknikon: *ili piknikis sub arbo.*


**pingven/o.** Mara birdo nigra-blanka, kiu ne povas flugi, sed uzas la flugilojn por tre lerte naĝi, vivanta en la sudaj partoj de la tero, precipe en Antarkto. (Spheniscidae.)

**pis/i** (familiare) Urini: *la infaneto pisis en pispoton; ĉi tie hundoj pisas.*

**pis/o.** Ago pisi kaj ties rezulto (pisaĵo).

**pis/aĵ/o.** Urino.

Daŭrigota



# El “Mia jarcento”

de Günter Grass

En 1999 aperis *Mia jarcento* de Günter Grass — cent mallongaj rakontoj, mozaikeroj de la dudeka jarcento. El malsamaj perspektivoj aperas malsamaj personoj: simpatiaj kaj malsimpatiaj, krimuloj kaj viktimoj, viroj kaj virinoj. Tiuj rakontetoj ligiĝas intime kun la germana historio, kaj finfine el la bunta ĥaoso aperas plena bildo de nia dudeka jarcento. Jam ses ĉapitroj el *Mia jarcento* aperis en *La Ondo de Esperanto*, elektite kaj tradukite de Wolfgang Kirschstein. Nun ni proponas la sepan.

## 1908

Tio estas kutimo en nia familio, la patro kunprenas la filon. Jam mia avo, kiu estis ĉe la fervojoj kaj sindikate organizita, kunprenis sian unuenaskiton okaze de publikaj paroladoj de Wilhelm Liebknecht en Hasenheide. Kaj mia patro, kiu ankaŭ estis ĉe la fervojoj kaj partiano, enigis en mian cerbon la kvazaŭ profetan frazon de la grandmanifestacioj, kiuj dum la regado de Bismarck estis malpermesitaj: “La anekso de Alzaco-Loreno alportos al ni ne la pacon, sed la militon”.

Nun li kunprenis min, la naŭ- aŭ dek-jaran bubeton, kiam la filo de Wilhelm, Karl Liebknecht, parolis, aŭ subĉiele aŭ, kiam tio estis malpermesita, en plenfumigitaj drinkejoj. Li veturis kun mi ankaŭ al Spandau, ĉar tie Liebknecht kandidatiĝis por la balotoj. Kaj en la jaro kvin mi eĉ rajtis per fervojo veturi al Lepsiko, ĉar patro estis lokomotivkondukisto kaj ricevis senkostajn biletojn, ĉar tiam parolis Karl Liebknecht en la Roka Kelo de Plagwitz pri la granda striko en la Rura regiono, pri kiu raportis ĉiuj gazetoj tiutempe. Sed li ne nur parolis pri ministoj kaj agitis kontraŭ la prusaj kamparaj kaj industriaj junkroj, sed li ankaŭ profete diskonigis la ĝeneralan strikon kiel la estontan batalilon de la proletaj amasoj. Li parolis libere kaj prenis la vortojn el la aero. Kaj jam li estis ĉe la revolucio en Ruslando kaj sangmakulita carismo.

Intertempe foje estis aplaŭdoj, kaj fine unuanima rezolucio, en kiu la

delegitoj — mia patro asertis, ke certe estis pli ol du miloj — solidaris sin kun la heroaj batalantoj en la Rura regiono kaj en Ruslando.

Eble eĉ tri miloj amasiĝis en la Roka kelo. Mi ja vidis pli ol mia patro, ĉar mi sidis sur ties ŝultroj, kiel li faris, kiam Wilhelm Liebknecht aŭ Bebel parolis pri la situacio de la laboristoj. Tio ja estis kutimo ĉe ni. Ĉiukaze mi kiel bubeto ne nur vidis, sed ankaŭ aŭdis kamaradon Liebknecht, ĉiam levita, kvazaŭ el alta observejo. Li estis oratoro por la amaso. Liaj vortoj neniam elĉerpiĝis. Speciale li ŝatis agiti por la junularo. Sur libera kampo mi aŭdis lin voki super miloj da kapoj: “Kiu posedas la junularon, tiu posedas la armeon!” Ĉiukaze mi ektimigis sur la ŝultroj de mia patro, kiam kamarado Liebknecht stertoris al ni: “La militarismo estas la brutala plenumanto kaj sangfera projekta barilo de l’ kapitalismo!”

Mi ja memoras eĉ hodiaŭ, ke mi tutsimple timegis, kiam li parolis pri la interna malamiko, kontraŭ kiu necesas batali. Probable pro tio mi urĝe bezonis piseti kaj glitis jen kaj jen sur la ŝultroj de mia patro. Sed mia patro ne rimarkis mian bezonon, ĉar li estis entuziasmigita. Sed tiam mi ne plu povis reteni min sur mia alta posteno. Kaj jen okazis en la jaro sep, ke mi tra la pantalono plenpisis la nukon de mia patro. Nelonge post tio kamarado Liebknecht estis arestita kaj devis, ĉar la plej supera tribunalo estis kondamninta lin pro la batalverko kontraŭ la militarismo, pun-sidi en la fortikaĵo de Glatz la tutan jaron 1908 kaj pli.

Sed post kiam mi pripisetis en plej urĝa bezono la dorson de mia patro, tiu deprenis min de siaj ŝultroj kaj ankoraŭ dum la manifestacio, kiam kamarado Liebknecht agitis por la junularo, li trabatis min tiel, ke mi longe poste sentis lian manon. Kaj tial, nur tial, mi iris al la loka konskripta oficejo, kiam ĉio ekis, kaj anoncis min libervole, eĉ estis dekorita pro braveco, kaj fine post du vundiĝoj ĉe Arras kaj Verdun mi estis suboficiro, kvankam mi, eĉ kiel rotestro en Flandrio, certis, ke kamarado Liebknecht, kiun kelkaj de miaj kamaradoj poste, multe pli poste mortpafis same kiel kamaradinon Rosa kaj ĵetis unu el la kadavroj eĉ en la enurban kanalon, centoble pravis, kiam li agitis por la junularo.

Tradukis el la germana  
**Wolfgang Kirschstein**

## Historia noto

**Wilhelm Liebknecht** (1826–1900) estis unu el la fondintoj de la socialdemokrata partio en Germanio. **Karl Liebknecht** (1871–1919) estis pli radikala ol la patro kaj fariĝis kunfondinto de la germana komunista partio. Kune kun **Rosa Luxemburg** (1871–1919) li estis murdita de dekstraj milicianoj (“liberaj regimentoj”). Karl Liebknecht publikigis en 1907 la verkon *Militarismo kaj kontraŭmilitarismo*, pro kiu li estis malliberigita.

**Hasenheide** estas parko en Berlino. La roka kelo de **Plagwitz** estas novbaroka konstruaĵo el la jaro 1890 kaj renkontiĝejo de la laborista movado.

# La ĵusa Biblio (1)

## Recenza eseo de Sergio Pokrovskij

Du internaciaj organizaĵoj: IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kaj KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) preparis novan version de esperantlingva Biblio, kiun eldonis la ĉeĥa eldonejo KAVA-PECH. Ĝian enhavon priskribas la titolpaĝo:

### Biblio

La Malnova Testamento  
tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof  
kun la Duakanonaj Libroj  
tradukitaj de Gerrit Berveling  
La Nova Testamento  
tradukita de la Brita Komitato (...)

Do, ĝi konsistas el la bone konata Londona Biblio (LB), plus kelkaj kromlibroj kiujn la protestantoj kaj la Biblia Societo kutime malinkludas. Mi signos ĉi tiun novan version per KB (“B” de “Biblio”; kaj “K” pro pluraj K-oj ĝin karakterizantaj: en la du editoraj organizaĵoj, “K”atolika kaj “K”ristana; en la eldonejo KAVA-PECH).

Ĉi tiu KAVA-PECH iom malmodeste aperas sur la kovrilo sub kruco malklare lumetanta tra ruĝa nebulo. Kvantkam la koncerna Biblio estas ne simple kristana, sed eĉ iom speciale romkatolika, mi preferus ke tie ne estu specifa konfesia emblemo, en la espero ke ankaŭ la judismanoj povu ĝin profiti (probable tio estus konforma al la intenco de Zamenhofo).

Kromajn informojn pri kelkaj ŝanĝoj de KB donas la “Rimarkoj” sur la lasta paĝo (1374<sup>a</sup>):

La duakanonajn partojn ni — kun la permeso de la tradukinto — envicigis en la Malnovan Testamenton laŭ la maniero de la Vulgato. Ili estas facile ekkoneblaj pro la kursivaj literoj ... La versiklojn ni ĝenerale nombris [t.e. *numeris* — S.P.] laŭ la Nova Vulgato de 1979. Kie la ĝisnuna esperanta teksto havas alian nombradon [t.e. *numeradon* — S.P.], ni signis la koncernajn versiklonumerojn per steleto (\*).

La psalmo-nombradon de la Vulgato ĝis la jaro 1979 (Vg) ni menciis per klarigoj.

Klarigoj troveblas je la fino de la koncerna ĉapitro aŭ psalmo. Pri ili atentigas la signo de du steletoj (\*\*). Por ke oni pli facile ekkonu la

strukturon de la teksto kaj pli rapide trovu perikopojn, ni enŝovis intertitolojn, kaj laŭokaze la hebrean alfabeton. (...)

Antaŭ ĉio ni ekzamenis la sorton de nia heredaĵo (t.e. de la tekstoj el LB) en la nova eldono; la kromaĵoj (la tekstoj eksterkanonaj) meritis apartan artikolon.

### Tipografio

Ekzameninte la titolan kaj la lastan paĝojn, nun ni foliumu la libron kaj konsideru la tipografian aspekton de KB.

Unue mi menciis plibonigojn kompare kun LB: la paĝonumerado regule progresas tra la tuta libro, de la unua paĝo ĝis la lasta; kaj la libro havas unu komunan enhavtabelon por ĉiuj partoj. Tio certe estas pli oportuna ol la du numeradoj kaj du disaj enhavtabeloj (la dua — kaŝita meze de la libro) en LB. Fakte, LB prezentas du apartajn librojn kune binditajn.

KB estas iom pli alta ol LB (205 mm kontraŭ 184 mm) kaj proksimume samlarĝa. Por mi tio estas nek avantaĝo, nek malavantaĝo (supozeble la altigo estas ŝuldata al la postuloj de la serio *Oriento-Okcidento*: KB estas ties “eksterordinara eldono”).

La linioj de KB estas je proks. 24% pli altaj ol en LB (3,33 mm kontraŭ 2,68 mm); la tipara grado estas egala; tial KB havas pli grandan interlinian spacon, kio gravas por lingvo kun supersignoj; la presaĵo estas pli “aera”, malpli kompakta (en LB interlinia spaco preskaŭ malestas).

La sekvan mi opinias malavantaĝoj de KB.

La tuta KB estas kompostita en senserifa tiparo. Iuj eble ŝatas tion, tamen

laŭ mia gusto tio estas tre malbela. Tiom pli malbela, ke nemallongaj pecoj aperas en senserifa kvazaŭkursivo.

La tipografia arto konsiderinde malprogresis kompare kun la epoko de LB. En la biblia teksto sporade aperas vers-eca tekstaranĝo; tio helpas rekoni ritmon sintaksan aŭ semantikan (en la originalo, eble, ankaŭ ian prozodion?). Nu, la versecaj linioj tre ofte (en almenaŭ duono da okazoj) estas pli longaj ol la kolumnolarĝo. Vidu sur la paĝosuba bildo kiel ĉi tiun problemon solvas LB kaj KB:

Ĉu necesas komenti? La ritmo de LB estas klara kaj bela; KB stumblas en ses linioj el naŭ: jen pro la versiklonumero, jen pro la malbele faldita linivosto. Mi certe preferus la naivan kontinuan aranĝon de la koncernaj tekstopecoj, ol tiel mise versecan; tamen male — kompare kun LB, en KB tre rimarkeble plimultiĝis la verseca aranĝo, kaj plejparte, tute stumbe.

Komprenoble mi juĝas laŭ miaj subjektivaj preferoj; aliaj homoj havas alian belguston, ekzemple Don Harlow, tute male, notis en sia blogo: “Mi ĝenerale trovas ĉi tiun eldonon pli alloga kaj pli facile legebla ol la pli fruaj eldonoj”.

### La Nova Vulgato

Por priskribi alian ŝanĝon rilate al LB necesas diri kelkajn vortojn pri “la Nova Vulgato”, ĉar tiu malfeliĉa projekto estas malmulte konata ekster la romkatolika mondo.

Kiam en la jaro 1546<sup>a</sup> la Trenta koncilio deklaris Vulgaton aŭtenta vorto Dia, ties definitiva formo ankoraŭ ne ekzistis. Nur sub Klemento la Oka aperis stabila versio (1592), kaj tiu “Klementa Vulgato” dum preskaŭ kvar

IJOB	4. 21—6. 5	JOB 5	601
on	17 Feliĉa estas la homo, kiun punas Dio;	17 Feliĉa estas la homo, kiun punas Dio;	
as	Kaj la moralinstruon de la Plejpotenculo ne malŝatu;	Kaj la moralinstruon de la Plejpotenculo ne malŝatu;	
os	18 Ĉar Li vundas, sed ankaŭ band-aĝas;	18 Ĉar li vundas, sed ankaŭ banda-ĝas;	
vi	Li batas, sed Liaj manoj ankaŭ resanigas.	Li batas, sed Liaj manoj ankaŭ resanigas.	
la	19 En ses malfeliĉoj Li vin savos; En la sepa ne tuŝos vin la malbono.	19 En ses malfeliĉoj Li vin savos;	

jarcentoj tenis la statuson atribuitan al Vulgato fare de la Trenta koncilio.

Pasis 419 jaroj post tiu Trenta decido, kaj antaŭ ol finiĝis la Dua Vatikana koncilio, papo Paŭlo la Sesa, pli radikala ol la koncilio, nomumis komisionon pri “la Nova Vulgato”, kies celo estis fari pri la tuta Klementa Vulgato tion, kion la koncilio proponis fari pri ties Psalmaro: revizii ĝin laŭ la rezultoj de la modernaj esploroj filologiaj por uzo en la reformita liturgio.

Tiu celo ne realiĝis, ĉar antaŭ ol la komisiono finis sian laboron, Paŭlo la Sesa subite faris ankoraŭ unu konsiderinde pli radikalan paŝon ol kian antaŭvidis la koncilio, kaj tute rezignante pri la ĝistiamia *pilatismo* (vd mian studon pri “La slavonaj skriboj” en *LODE*, 1999, №2) permesis nacilingvajn diservojn. Kiam post ok jaroj (en 1979) la ĵus elektita Johano Paŭlo la Dua oficialigis la Novan Vulgaton, ĝi jam ne plu estis bezonata.

Praktike la revizio laŭ la modernaj rezultoj filologiaj signifis proksimiĝon al la tradukoj protestantaj, kiuj jam delonge faris tiajn ŝanĝojn. Sed eble por eviti tian komparon, la Nova Vulgato iom pli radikale proksimiĝis al Tanaĥo (la Hebrea Biblio) — pli radikale ol estas prudente; kaj unu el tiaj malprudentaĵoj misinfluis nian KB.


### La Nova Vulgato kaj KB

Oni rajtas demandi, kial tiu malprospera projekto de unu el pluraj kristanaj konfesioj traduki la Skribojn en malvivan lingvon ne plu uzatan eĉ liturgie, influu la esperantan Bibliion?

LB jam estis “novvulgata” longe antaŭ ol la Nova Vulgato aperis eĉ kiel projekto: tradukita el la fontaj lingvoj kaj atentanta la protestantan tradicion, LB jam dekomence estis libera de la eraroj de la Klementa Vulgato (kiel la ĉiam citata “exultabo in Deo *Iesu meo*” anstataŭ la ĝusta “Mi estos gaja pri la Dio *de mia savo*” el Ĥab 3:18) kaj numeris la psalmojn laŭ Tanaĥo. Feliĉe, KB ne tuŝis la tradiciajn tekstojn de LB (almenaŭ, mi ne rimarkis tiajn ŝanĝojn); la misinfluo de la Nova Vulgato koncernas la versiklonumerojn.

La originala Tanaĥo ne havis disdividon en ĉapitrojn (por la diservaj celoj tamen estis apartigitaj certaj legaĵoj). La versikloj estis disigitaj per speciala interpunkcia signo, sed ili ne estis numeritaj.

La disdividon en ĉapitrojn inventis la okcidentaj kristanoj (en la 13<sup>a</sup> jc), kaj ĝin imitis rabeno Isaako Natano en la



15<sup>a</sup> jc. De tiam ĝi ekzistas ankaŭ en la hebrea tradicio, kvankam iuj judismanoj opinias ĝin sakrilegia fremda misinfluo. En kelkaj lokoj la ĉapitrolimoj Tanaĥaj estas iom ŝovitaj kompare kun la kristanaj — jen pro stilaj konsideroj de la teksto originala, jen ĉar la kristanan disdividon oni opiniis ideologie motivita, jen ial sen evidenta motivo.

Ĉiel ajn, de post la jaro 1555<sup>a</sup>, kiam Roberto Stefano (*Robert Estienne*) eldonis en Parizo sian Vulgaton kun disdivido en ĉapitrojn kaj kun numeritaj versikloj, la kristana sistemo de versiklonumerado disvastiĝis tra la tuta Kristanujo. Ankaŭ LB ĝin uzas. Tamen la Nova Vulgato — kaj KB — reformis tion.

Tipan diferencon oni povas vidi ĉe la limo inter la ĉapitroj 31<sup>a</sup> kaj 32<sup>a</sup> de Genezo. La epizodo priskribas fuĝon de Jakobo el la domo de Labano; la postkuron de Labano; repaciĝon inter Jakobo kaj Labano, ilian vespermanĝon kaj endormiĝon; vekiĝon kaj foriron de Labano; pluan vojiron de Jakobo.

Laŭ la kristana tradicio LB metas limon inter la foriro de Labano (kiu ne plu aperas en la rakonto) kaj pluiro de Jakobo (en kies vivo komenciĝas nova paĝo). Tute logika kaj konvena dispartigo, laŭ la alta tuteposa vidpunkto: fino de la 20-jara servado en ĉap. 31<sup>a</sup> — la lukto kun la Anĝelo post kiu Jakobo iĝas Izraelo en ĉap. 32<sup>a</sup>. Tanaĥo kaj KB metas limon pli banale-kronologie: ili endormiĝis, ĉap. 31<sup>a</sup> finiĝas; ili vekiĝis, komenciĝas ĉap. 32<sup>a</sup>. Ankaŭ ĉi tiel eblas dislimi — kvankam mi vidas nenian avantaĝon en tio.

La versiklonumeroj ne estas parto de la teksto; ilia celo estas oportuno de referencado, ĉu en verkoj teologiaj aŭ historiaj aŭ filologiaj. Por tiu funkcio plej gravas stabilo kaj unueco. La

koncerna ŝanĝo neniel ajn ŝanĝas la senco de la teksto, ĝi nur iomete banaligas la stilon. Tamen sekve de ĉi tiu sennecesa novvulgata ŝanĝo ŝoviĝis la numeroj de 32 versikloj. La Nova Vulgato iĝis konforma al la neoficiala numerado Tanaĥa — sed malkonforma rilate al la tradicia numerado de la resto de la Kristanujo (kaj al la antaŭa 4-jarcenta tradicio de la Roma Eklezio mem, ankaŭ en la papaj enciklikoj; ankaŭ al la centjara tradicio esperanta).

Eble la renumerado laŭ la Nova Vulgato oportunas por la katolikoj uzantaj tiun novan Vulgaton paralele kun KB (sed kiu nun uzas latinan Bibliion?); sed ĝuste pro la sama renumerado ĝi estas maloportuna por la uzantoj de la versio tradicia — ekzemple por la ruslingvanoj kiel mi mem. Inter la Biblioj rusaj kaj anglalingvaj eldonitaj dum la lastaj 20 jaroj mi ĝis nun renkontis neniun kun la novvulgata numerado.

### La titoloj libraj

La tuta kolekto KB nomiĝas simple *Biblio* anstataŭ la pleonasma *La Sankta Biblio* (LB); ĉi tion mi aprobas.

Ne ĉiuj titoloj de la kanonaj bibliaj libroj estas la samaj kiel en LB. La diferencoj:

- *Psalmaro* iĝis *Psalmoj*;
- *Sentencoj* iĝis *Sentencoj / Proverboj*;
- *Predikanto* iĝis *Predikanto / Kohelet*;
- *Plorkanto* iĝis *Plorkantoj / Lamentado*.

Mi ne komprenas, kial necesas enkonduki tian heziton en la jam stabilan tradicion esperantan. Supozeble temas pri oportuno de fakuloj ne kapablaj lerni Esperanton kaj konfuzantaj sentencojn kun proverboj.

La titolvariantoj ĉi-supre estas cititaj laŭ la Enhavtabelo; en la titola pozicio mem aperas jen sole la tradicia formo esperanta, ekzemple “La sentencoj de Salomono”; jen ambaŭ formoj: “La Predikanto (Kohelet)”. Paĝotitole aperas jen la tradicia formo (ekzemple “Sentencoj”), jen la fremda (ekzemple “Kohelet”).

La Enhavtabelo rekomendas mallongigojn por referenci la bibliajn tekstojn. Ne ĉiuj el ili estas malbonaj; sed “Koh”, “Lam” estas nerekoneblaj fremdaĵoj, kaj “Kan” estas almenaŭ perpleksiga (ĉu “La Alta Kanto”? ĉu “Plorkanto”?). Ankaŭ “Ago” estas ĝena pro sia ŝajne ununombra formo.

## Cent slovakiaj gravuloj

Vajs, Ján. *100 gravaj personoj de slovakia Esperanta movado. — Partizán-ske: Espero, 2007. — 48 pĝ., il.*

Ján Vajs kaj 16 liaj helpantoj verkis enciklopedieton biografian de 100 eminentaj Esperantaj agantoj de Slovakio. Temas pri 80 slovakaj kaj 20 eksterlandaj esperantistoj kiuj kontribuis al la slovakia E-movado. En la verko estas prezentitaj 41 fotoj de la personoj.

Atenta leganto trovas en ĉi tiu konsultlibro sekvajn mankojn. Kvankam la kompilinto uzis la *Enciklopedion de Esperanto*, kiu rekomendas inter krampoj indiki la nom-prononcon, en la verko la rekomendo ne ĉiam estas konsiderita. Ekzemple, sur la 27a paĝo estas Pretschnerová Katka sed kiel prononci la familian nomon mi ne scias: ĉu Preĉnerová, ĉu Pretŝnerová, ĉu alimaniere? En la sama paĝo estas Procházká Jaroslav, sed kiel legi la familinomon: ĉu Proházká, ĉu Pročázka? La ekzemplo abundas tra la tuta verko.

La kompilinton helpis 16 personoj, sed inter ili mankas rusa kaj Estonia helpantoj kiuj povus kompletigi informojn pri rusa kaj estona esperantistoj. Temas pri Evstifejev Nikolaj kaj Seppik Henriko. Pri ambaŭ la kompilinto povus ricevi kontentigajn informojn ĉe Ruslanda E-Unio kaj Esperanto-Asocio de Estonio.

Malgraŭ la supre menciitaj mankoj la verko de Ján Vajs meritas esti kiel kerno de la iam kompletigota *Granda Enciklopedio de Esperanto*.

Anatolo Sidorov



**Klasika versromano de Puŝkin**  
**256 paĝoj / 20 eŭroj**  
**Aĉetebla en ĉiu granda libroservo**

## La intertitoloj

En la teksto de kelkaj ĉapitroj nun aperas “intertitoloj” de perikopoj aŭ apartaj epizodoj. Mi ne scias, kiom multas bibliaj legaĵoj en la romkatolika diservo; se nur la markitajn en KB oni voĉlegas, ili estas malmultegaj kompare kun la ortodoksaj.

El pluraj samenhavaj epizodoj novtestamentaj nur po unu estas markita (supozeble la versio legata en diservo); ekzemple la Montoprediko havas intertitolon en *Mateo* 5 — sed ne en *Luko* 6. Aliflanke, la Dek Ordonoj estas markitaj (per la ĵargona vorto “Dekalogo”) ambaŭloke, kaj en *Eliro*, kaj en *Readmono*. La Sinjora Preĝo havas nenian intertitolon, nek en *Mateo* 6:9, nek en *Luko* 11:2.

Du kontraŭaj intencoj manifestiĝas pri *Predikanto*, ĉap. 5<sup>a</sup>. Post la versiklo 4:16 aperas intertitolo: “Konsilioj pri religiaj aferoj: Koh 4,17–5,5 (5,1–7)”. Alivorte, en LB la senca unuo tre konvene okupas la komencon de ĉap. 5<sup>a</sup> (nova temo — nova ĉapitro); sed post la novvulgata ŝovo de la ĉapitraj limoj ĝi disrompiĝis inter ĉap. 4<sup>a</sup> kaj 5<sup>a</sup> (kaj la versiklonumerado ŝoviĝis). La nove enkondukita intertitolo atestas pri fuŝeco de la nove enkondukita ĉapitra disdivido.

En diversaj libroj la principoj de intertitola disdivido estas tute malsamaj. La ĵus menciita tekstopeco ampleksis sep versiklojn; la tuta *Genezo* entenas nur tri intertitolojn, ĉiu por multeĉapitra fragmento:

- La komencoj
- La patriarkoj
- La filoj de Jakob.

Fakte, “La komencoj” estus nemalbona titolo por la tuta libro, anstataŭ la greka “Genezo” (kp ankaŭ ĝian nomon Tanaĥan); sed ĉi-okaze ĝi ampleksas multe da famaj mitoj (sen apartaj inter-

titoloj), ekde la Mondokreo, la Kreo de la virino, la Prapeko, Kaino kaj Habelo, ... la Diluvo, la Babelturo. La titolo “La patriarkoj” estas duoble fuŝa: unue, ĉar la koncerna termino en la Zamenhofa traduko estas sole kaj nur “prapatro”, vorto pli klara, simpla kaj nekonfuzebla kun titolo de eklezia altrungulo; kaj due, ĉar ankaŭ ekster la koncerna parto de *Genezo* temas pri la prapatroj Adamo kaj Noa, pri la prapatrino Eva, pri la prapatroj de la 12 triboj Izraelaj.

(Verdire, la vorton “patriarko” misuzis jam la londonaj tradukistoj; ekzemple “la patriarko David” en *Agoj* 2:29, kie ĝi estas speciale malkonvena, ĉar tie David aperas ne kiel banala generinto de multenombra idaro, sed kiel *prapatro*, *praulo* de la Mesio, de “la Filo de David” — *Mateo* 1:1, 9:27, 12:23, 15:22, 21:9. La vorto *prapatro* taŭgas por esprimi rilaton de praulo al posteulo, la vorto *patriarko* por tio malkonvenas.)

Bedaŭrinde la intertitoloj ne estas sufiĉe klare apartigitaj disde la tradicia teksto (ili estas samtiparaj kiel la ĉefteksto, kvankam tutmajuskaj); tial la leganto povas miskompreni, ke la stile ŝokaj intertitoloj, kiel “Oldaj sentencoj kritike esploritaj: Koh 6,11–9,6” aŭ “Diskursoj (Ijo 2,11–31,40)” aŭ “La patriarkoj” apartenas al Zamenhofo.

Tute enigma estas la intertitolo “La suprenleviĝo de Jesuo: Joh 18,1 – 20,29”. Unuarigarde ĝi ŝajnas reformita “Ĉieliro”; tamen Johano ja ne rakontis pri la Ĉieliro! Fakte la indikita peco rilatas al pli frua kaj konsiderinde longa ĉeno da epizodoj ekde la perfido de Judaso ĝis la krediĝo de Tomaso (en la aliaj evangelioj tia rakonto portas la titolon “Pasiono kaj releviĝo de Jesuo”). Mi suspektas ke tie okazis redakta eraro, kiel ĉe “Laŭdkanto de la Maria” (*Luko* 1:46).

Daŭrigota

## Al novaj terenoj en nia eldonurbo

La lastan novembran dimanĉon Halina Gorecka prelegis pri historio de Esperanto en Kenigsbergo-Kaliningrado kadre de la monata kunveno de la kaliningrada regionografia societo.

Ŝi rakontis al kelkaj dekoj da fakuloj kaj interesitoj, kunvenintaj en la regiona arkivo, pri la unua Esperanto-Societo en Kenigsbergo, pri la loka esperantista agado inter la du mondmilitoj, pri la kvaron-jarcenta silentado dum la Hitlera kaj Stalina ŝtatoj, pri la renaskiĝo en la 1960aj jaroj, kaj pri la nuna aktivado de esperantistoj en la plej okcidenta regiono de Ruslando.

Per ĉi tiu prelego finiĝis la solenado de la cent-jariĝo de Esperanto en la urbo de Kantio. Ni dankas al la Germana Esperanto-Asocio pro subteno.

Venont-jare kaliningradaj esperantistoj partoprenos en festado de la cent-jariĝo de UEA, kaj en 2009 ili okazigos festkunvenon okaze de la centjariĝo de *La Ondo de Esperanto*, nun eldonata en Kaliningrado.

KREU

## Bonvenon al ambaŭ!

**Bociort, Ignat Florian.** *Bedaŭrinda verko: Repliko al Tazio Carlevaro “Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?”* — Eschwege: Copy & Co, 2007. — 20 pĝ.

Aperas, ekstrakte kiel aparta broŝuro, artikolo publikigita en *Scienca Revuo* 2007/3 kaj ĵus aperinta, en apenaŭ iom alia redakto, ankaŭ en la lasta monumenta verko de la aŭtoro<sup>1</sup>. La subtitolo anoncas «Repliko al Tazio Carlevaro “Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?”». Nu, la broŝureto de Carlevaro, aperinta jam unuaelone en 1999<sup>2</sup> certe agacis la fidelan esperantistaron; en ĝi la tiĉina psikiatro, bone konata en la esperantista medio, esploras la kaŭzojn pro kiuj la ideo de planita mondlingvo ne akiris vastan publikon. Ekde 1997 je la sukceso de la lingvo, almenaŭ en okcidenta Eŭropo, li ne plu kredas, surbaze de antaŭvidoj pri la evoluo de politika, socia, ekonomia historio. La sukceson de la angla li rilatigas al demokrata elekto de la ordinaraĵoj, kiu sekvas la rapidan materian utiligeblon de la iloj, por kies akiro ili investis tempon kaj monon. Ĉu tio estas “morala”, ne havas sencon diskuti: moralon kreas homoj kaj kio aspektas morala hodiaŭ povas aspekti malmorala morgaŭ aŭ postmorgaŭ.

Kompreneble, prognozaj bazitaj sur la pasinteco povas jen trafi, jen mal-. La neakordigeblo de la du kontraŭaj tezoj naskiĝas jam el la historio de la protagonistoj. Carlevaro (nask. 1945) vivis ĉiam en okcidenta libera socio kaj en lando kie lingva diverseco estis kutima; lia interesiĝo pri planlingvoj neniam suferis persekutojn aŭ gravajn malhelpojn. Li alvenis al Esperanto post lernado de Ido, kaj li studis kaj publikigis ankaŭ en Interlingua: lia kompetenteco estas atuto por ĉiu el la tri movadoj celantaj disvastigon de la ideo de internacia komunikado per iu specifa planlingvo. La longa listo de la kontribuajtoj de Carlevaro al la Esperanta kulturo dum pli ol kvardek jaroj, inkluzive la partoprenon en la literatura rondo *La Patrolo* ankaŭ kiel patrolestro (strange ne menciitan en la enciklopedio de Künzli<sup>3</sup>) metas lin ekster ĉian suspekton pri apostateco, kabeiĝo aŭ similaj anatemoj. Li rigardas la nunon kaj el tio prognozas la estontecon.

Prof. Bociort (nask. 1924) estas dudek jarojn pli maljuna kaj vivis plejparte en socio, kie Esperanto estis longtempe malpermesita. El sia elstara universitata posteno li laboris kaj batalis por rajti konigi la problemon de la interhoma

interkompreniĝo kaj de ĝia solvo pere de Esperanto. Tial la lingvo por li fariĝis ilo de interhoma frateco, ĝuste kiel planis ĝin Zamenhof dekomence (“ni ĵuris labori, ni ĵuris batali”) kaj kiel intencis ĝin la UEA-fondintoj. Li venkis en sia batalo longa jardekojn, do li konscias kiom da tempo kaj laboro estas bezonata por antaŭenigi ideon en ideologie direktita socio: la nuno estas la estonteco de la paseo, tial li prave ne haltas je la nuno, sed rigardas transen. Se la nuna momento favoras la ekspansion de la angla, ni ja al kutimiĝis al alterno de klimaksoj kaj ŝrumpoj de lingvoj, de ideologioj, de armilaj fortoj. Al la argumentado, ke tamen la angligo invadas la tutan mondon, respondo estas: ankaŭ la franca lingvo, aŭ la germana armila potenco, aŭ la rusa ŝtata ideologio ŝajnis, en la momento de sia klimakso, povi konkeri la tutan mondon, sed estis ĉiam parto de la mondo kiu poste leviĝis kaj turnis la evoluon alidirekten. Eble okcidentanoj opinias, ke ili vidas senvuale la tutan mondon; orienteŭropanoj al kutimiĝis, ke ofte la “tuta mondo” kiun oni vidas, estas simple nur tiu mondoparto, kiun la reganta socio/ideologio (nomu ĝin komunismo, kapitalismo, globalismo, tutmondiĝo, parlamenta demokratio) permesas vidi. La komparo de du malsamaj, sed same tute bonfidaj, “veroj” deklarataj de “vidintaj atestantoj” ĉe juĝejo devus instrui, ke eĉ diversaj vidpunktoj estas plenrajte defendeblaj.

El tiu esenca diferenco de historio kaj de alrigardo al (sia) parto de la mondo maturiĝas diferenco de konkludoj, pri kies efektiviĝo nur venontaj jar(cen)toj verdiktos. Carlevaro konsilas ke homo, rimarkinte ke ĉe kazina ludotablo li ne havas bonŝancon, foriri de ĝi por ne bankroti entute: li mem multon investis en la sukceso de Esperanto, kaj li ne pretas investi kromon. Bociort ĉerpas el sia

morala forto kaj plu ludas, certa ke lia ludostrategio alportos sukceson, eĉ se ne tujan; ankaŭ li multon investis, kaj en situacio ege pli malfacila ol Carlevaro, sed la morala kompenso kiun li ricevis interŝanĝe ŝajnas al li pli ol adekvata. Cetere tiun aktivan bilancon konfirmas ĉiuj kiuj (r)estas esperantistoj. La tiĉina psikiatro taksas la “ĝisostulojn” kiel personojn kiuj ne komprenis, ke Esperanto fiaskis; la rumana profesoro pri beletra estetiko kaj monda literaturo respondas, ke multaj morale bonaj ideoj devis longe barakti kaj plurfoje aspektis fiaskintaj, sed tamen nepras teni ilin vivantaj.

Bociort difinas “eraraj premisoj” kaj “nevalidaj argumentoj” iujn eldirojn de Carlevaro, apogante sin al aliaj pensuloj, kaj pluraj liaj citoj respondas ankaŭ al mia konvinko. Diras Borges: *Ekzistas birdoj kiuj flugas inverse*. Nu, ĉiu opinias sian flugon ĝustadirekta.

Kiel konkludi? Bonvenon al la broŝuro de Tazio Carlevaro, prilumanta lian percepton de socia evoluo kaj la rolon, laŭ li jam finitan, de Esperanto en ĝi; eĉ pli koran bonvenon al la broŝuro de Ignat Bociort, prilumanta lian koncepton de morala dezirindeco kaj donanta forton al la penoj de la ordinara esperantisto. La unua prezentas la socion en kiu ni vivas kaj ĝian traktadon de la kompreniĝo inter diverslingvanoj; la dua prezentas socion al kiu ni strebu, kaj tiu strebado donas plenecon al nia vivo.

**Carlo Minnaja**


### Notoj

1. Bociort I.F. *Esperanto* (Movado — Strategio — Estetiko — Rakontoj). — Timișoara: Mirton, 2007.
2. Carlevaro T. *Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?* — Bellinzona: Dubois, 1999 (2a eld. 2000).
3. Künzli A. *Universalaj lingvoj en Svislando*. — La Chaux-de-Fonds: SES, CDELI, 2006.

## Jacques Yvart invitas por vojaĝo

*Vinilkosmo* okazigos 16 feb 2008 en Dunkerque lanĉofeston de la dua Esperanto-disko de Jacques Yvart *Invito por vojaĝo*.

Per rimarkinda elekto de kanzonoj, Jakvo evoluigas unu el siaj preferataj temoj: la vojaĝadon. Oni tiel trovas do kaj kanzonojn de Leonard Cohen (*Birdo sur drato*), de Johnny Cash (*Diamantoj en Ĉilio* kaj *Fremdulo vojaĝanta*), de Georges Moustaki (*Mia liber*), de Georges Brassens (*La ĉevaleto*) kaj liajn proprajn komponaĵojn bele adaptitajn en Esperanto: (*En la valo de l' rozoj*, *Oe, oe en la ŝipo! Magelanoj de l' Universo...*), krome kelkajn poemojn muzikigitajn de li, ekzemple, la albumtita *Invito por vojaĝo* de Charles Baudelaire. Krom la 15 kanzonojn, “KD ekstra” entenas MP3-muzikon de *La tempo de l' ĉerizoj*, la karaokeajn versiojn de ĉiuj titoloj, kaj videosesion realigitan dum la registrado en la studio.



**Flo!**

## Bonan navigon, Karavelo!

Antaŭnelonge estis lanĉita reta literatura revuo *La Karavelo*, redaktata de João José Santos. Produkti tiaspecan revuon estas sufiĉe facile, do mi ne rapidis tuj recenzi, sed atendis sekvajn numerojn. Ja ne malofte okazas, ke bonan unuan n-ron sekvas pli pala dua, kaj post la tria aŭ kvara la tuta afero estingiĝas, la redaktoro(j) perdas entuziasmon. Dume la revuo tenas la promesitan — ĉiumonatan — oftecon, aperis du 24-paĝaj numeroj. La dosieroj estas iom pezaj (po ĉ. 2 Mb), do komputilo rimarkeble “bremsas”, traktante ilin, sed principe tio ne estas granda problemo.

Ĉiu deziranto, iom sperta pri ret-uzado, povas mem aliĝi al “lakaravelo” ĉe googlegroups, libere elŝuti la aperintajn numerojn kaj pridiskuti la revuon.

La revuo estas destinita ĉefe por prezenti kulturon, kreitan per la portugala lingvo — tamen ĉ. 25% okupas tradukoj el aliaj lingvoj (hungara, pola, greka, latina) kaj originalaĵoj. Komence de ĉiu numero la redaktoro klarigas sian eldonpolitikon. Laŭdindas la principo “la leganto legos kion la verkisto verkis” — t.e. la aŭtoro devas aprobi la definitivan tekstoversion.

Enestas poemoj kaj prozaĵoj — kurtaj noveloj kaj romanfragmentoj. Ankaŭ interesaj priskriboj de certaj lokoj, kun vere belaj bildoj. Ĉiu aŭtoro kaj/aŭ tradukanto estas prezentita per biografieto kaj kolora foto.

Grandan parton en la unua kaj dua numeroj okupas poemoj de portugala poeto Fernando Pessoa — evidente fama, sed ne sufiĉe konata eksterlande. Liaj poemoj ne facilas por kompreno — sed tio ne dependas de traduko, mem portugaloj diras pri apenaŭa kompreneblo de la originaloj. En kelkaj sinsekvaj n-roj aperas lia longa poemo *Mesaĝo*. La tradukinto, J.J.Santos, agnoskas, ke en la traduko li “konscie buĉoferas la rimon, por ke la dioj ne prenu aliajn pli gravajn elementojn de la poemo”. Alia tradukinto, Francisco Stefano Wechsler, tamen sukcesis transdoni poemon de Pessoa konservante ĉion.

Estas interesaj rakontoj pri pluraj verkistoj. La verkoj, precipe poezio, estas tradukitaj, ni diru, diversnivele. La lingvaĵo ĝenerale bonas, kvankam ie-tie aperas troa akuzativo. Oni (en koncerna diskutlisto) prave atentigas, ke arbo ne povas havi kudrilojn — nur pinglojn...

Aparte bonas tradukoj de Edward Jaśkiewicz el Zygmunt Krasiński (du poemetoj); elstaras originalaj poemoj de



portugala aŭtoro, kaŝinta sin sub la nomo EdNov.

Legeblas ankaŭ artikolo de Renato Corsetti pri esenco de Esperanto kaj intencoj de Zamenhof, pri historio de reformproponoj, kun ĉiam samaj alvokoj “redoni al virinoj kaj al neeŭropanoj sian lokon en Esperanto, ne tuŝante la Fundamenton”, kun longega listo de bonaj kaj malbonaj ekzemploj... pardonu, jam tedis.

Ĉirkaŭ la revuo jam formiĝis rondo de kunlaborantoj: al la unua numero kontribuis personoj el 10 landoj, al la dua — el 11. Ni esperu, ke *La Karavelo* navigos longe. La direktoro J.J.Santos (eble indas nomi lin kapitano?) intencas aperigi ankaŭ paperan version — nigra-blankan, po ses numeroj kune.

Do, bonan venton al *La Karavelo*! Sukcesan navigon al novaj havenoj, al novaj malkovroj!

P.S. La tria numero de *La Karavelo* devis aperi antaŭ la redaktifino de la januara *Ondo*, sed ĝi prokrastiĝis, ĉar la direktora komputilo paneis pro fulmotondro. Ni deziru kaj esperu, ke estonte *La Karavelo* evitu ĉiajn damaĝojn kaj malgraŭ ŝtormoj plu navigu ĉirkaŭ la mondo!

Valentin Melnikov

*Ni sendas gratulon al nia konstanta kunlaboranto Glebo Malcev kaj al Valentina Strajeva, okaze de la naskiĝo de ilia filino*

**Anastasija**

*kiu enmondiĝis la 27an de novembro 2007 en Kaŭno (Litovio) kun la pezo 3,688 kg.*

## Thorsen-Apogo donita al kvin bibliotekoj

Kvin bibliotekoj ricevis subvenciojn de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj.

Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller estis subvenciiitaj la bibliotekoj de la madagaskara Itaosy Esperanto-Klubo (125 EUR), Sankt-Peterburga Esperanto-Societo *Espero* (135 EUR), Kolombia Esperanto-Ligo (190 EUR), Kuba Esperanto-Asocio (200 EUR) kaj Bonaera Esperanto-Asocio (230 EUR).

Subvencioj de la Biblioteka Apogo estas disdonataj ĉiujare ekde 1997, kiam UEA ricevis mondonacon por tiu celo de ges-roj Thorsen, ambaŭ forpasintaj en la jaro 2006. Ĝis nun la fondaĵo disdonis subvenciojn por 14 mil eŭroj. Petoj pri subvencioj en 2008 devos atingi la Centran Oficejon ĝis 15 okt. Kun la peto oni sendu liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

GK UEA

## Kiom merda estas Gerda, aŭ Ĉu vi ridos brazile?!

**Gerda malaperis: DVD. — Arcos: Imagu, 2006.**

Ne necesas atendi de la lernofilmo perfektiga lingvouzon de progresantoj, la rafinitan guston de l' Oscar-ĉasuloj; tamen la kreaĵo de Joe Bazilio surbaze de krestomatia novelo de Claude Piron (kun elementoj de sadisma sekspluataĵo), danke al la multenombraj fuŝaĵoj (foje eĉ mikrofono enkadras), aspektas eĉ pli avangarde, ol la legenda *Incubus* (Ed Wood Jr. kaj Jess Franco neŭroze fumas flanke).

Imagu brazilan melodramon kun amatoraj geaktoroj (iu eĉ aknas), kies unusola talento estas klare prononci ĉiujn sonojn, kie ĉiu epizodo filmitas je la unua provo, kie scenaro idiotas, operatoro mantremas, lumas plenforte ĉiuj eblaj lampoj je la kosto de plejparto de l' mizera buĝeto... La dialogoj samtempe amuzas kaj sensencas; vundita Bob ial anstataŭ brandon postulas vinon; rusojn ĝojigos la ĵipo *Niva*...

Iu nomus ĉi-frenezaĵon “la kiĉaĉo”. Mi opinias ĝin l' altarto!!

Glebo Malcev



# Literatura konkurso Liro-2007



La juĝkomisiono de la tradicia Literatura konkurso *Liro-2007* (Aleksej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de *La Ondo de Esperanto*, ricevis 24 konkursaĵojn de 20 aŭtoroj el 7 landoj — Britio, Burundio, Francio, Irlando, Pollando, Ruslando, Ukrainio.

## La rezulto de Liro-2007

Originala prozo

Laŭreato: **Paul Gubbins** (Britio) pro *La sanktejo*.

Laŭda mencio: **Mihail Korotkov** (Ruslando) pro *Reveno de rezidento*.

Originala poezio

Laŭreato: **Hasano Ntahonsigaye** (Burundio) pro *La homo, kiu vin similas*.

Laŭda mencio: **Paŭlo Moĵajev** (Ukrainio) pro *Simpla rimaĵo*.

Traduka poezio (Poemoj de Saša Ĉjornyj)

Laŭreato: **Sergej Tiĥonov** (Ruslando) pro *Plastiko*.

Laŭda mencio: **Mikaelo Bronŝtejn** (Ruslando) pro *La dieto, Horora historio kaj Oranĝo*.

Traduka prozo el la rusa lingvo (*Anmekapua* de Anton Ĉeĥov)

Laŭreato: **Anna kaj Mati Pentus** (Ruslando).

Laŭda mencio: **Mihail Povorin** (Ruslando).

Traduka prozo el la angla lingvo (*Eveline* de James Joyce)

Laŭreato: **Russ Williams** (Pollando).

Laŭda mencio: **Jack Warren** (Britio).

*Gratulon al la laŭreatoj!*

*Dankon al la partoprenintoj!*

**Halina Gorecka**

sekretario de *Liro-2007*

## Ricevitaj libroj

*Biblio: La Malnova Testamento* / Trad. Ludoviko Lazaro Zamenhof; *Duakano-naj Libroj* / Trad. Gerrit Berveling; *La Nova Testamento* / Trad. John C. Rust, B. John Beveridge, C.G. Wilkinson. — Dobřichovice: KAVA-PECH, [2006]. — 1375 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Bociort, Ignat Florian. *Bedaŭrinda verko*: Repliko al Tazio Carlevaro “Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?”. — Eschwege: Copy & Co, 2007. — 20 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Tolkien, John Ronald Reuel. *La Kunularo de l' Ringo*: La unua parto de *La Mastro de l' Ringoj* / Trad. el la angla William Auld; Enkond. Aleksander Korĵenkov. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 464 pĝ., 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №3). — [Donaco de Sezonoj].

Tolkien, John Ronald Reuel. *La du turegoj*: La dua parto de *La Mastro de l' Ringoj* / Trad. el la angla William Auld. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 368 pĝ., 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №4). — [Donaco de Sezonoj].

Tolkien, John Ronald Reuel. *La reveno de la Reĝo*: La tria parto de *La Mastro de l' Ringoj* / Trad. el la angla William Auld. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 328 pĝ., 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №5). — [Donaco de Sezonoj].

Vajs, Ján. *100 gravaj personoj de slovakia Esperanta movado = 100 významných osobností slovenského esperantského hnutia*. — Partizánske: Espero, 2007. — 48 pĝ.; il. — [Recenzoekzemplero].

## Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2007/5; Esperanto en Danio. 2007/4; Esperanto. 2007/12; Heroldo de Esperanto. 2007/14; Komencanto. 2007/4; La Gazeto. 2007/132; La KancerKliniko. 2007/124; La Movado. 2007/680,681; La Ondo de Esperanto. 2007/12; Le Monde de l'Espéranto. 2007/564; Monato. 2007/12; Okazas. 2007/564; Sennaciulo. 2007/10; Tempo. 2007/96.

## Gazetoj

### *Pola Esperantisto* evoluas

Ekde la jaro 2008-a *Pola Esperantisto* estos proprajo de la Pola Esperanto-Asocio (PEA), atendanta informojn de Esperantaj organizoj en Pollando kaj en aliaj landoj. *Pola Esperantisto* estos principe informra revuo kun la celo kunigi la movadon sendepende de apartenco al la Asocio. Respondante je petoj de niaj anoj kaj simpatiantoj, ni planas novajn fakojn kiel kalendaron pri E-aranĝoj en Pollando, interesaj okazintaĵoj kaj agoprogramoj, valoraj iniciatoj, proponoj por superregiona kunagado (inter ili instruado por aktivuloj de E-movado, komunajn projektojn pri financa apogo de gravaj landaj programoj), lingvajn konsilojn, raportojn pri E-kunvenoj, ret-angulon, angulon por poetoj, paĝon de Animzorganto, lokon por opinioj kaj konsiloj de legantoj.

La nova revuo informos pri aktualaĵoj de la pola E-movado, reaktivigo de tradiciaj landaj kongresoj, preparoj por UK-2009, novaĵoj pri filioj kaj kluboj, ekzemploj de kunlaboro kun eksterlandaj organizoj.

Ni tre dankas al ĝisnuna eldonisto sinjoro Kazimierz Leja — posedanto de eldonejo *Hejme* — pro kelkaj jaroj de lia laboro, reaktivigo, kaj popularigo de la revuo.

Kunlabori konsentis Barbara Pietrzak, Danuta Kowalska, Elżbieta Karczewska, Roman Dobrzyński, Gabriela Kosiarska, Czesław Baranowski, Stanisław Mandrak, Halina Komar, Robert Kamiński, Irek Bobrzak kaj aliaj, el kiuj estos elektita la redakcio.

La unua numero baldaŭ aperos. Abonprezo: 35 zlotoj por Pollando, aŭ 12 eŭroj (eksterlando).

✉ PZE O/Lodz, skr.poczt.20, PL 90-431 Łódź 36, Pollando.

**Robert Kamiński**

sekretario de PE

**Monato**  
INTERNIA MAGAZINO SENDEPENDECA

**La mondo iĝas por vi malpli kosta!**

Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon MONATO dum 3 monatoj senpage.

Por pliaj informoj kaj kondiĉoj vizitu: [www.monato.net](http://www.monato.net)

aŭ skribu al MONATO  
FLANDRA ESPERANTO-LIGO  
FRANKRIJKLEI 140  
B-2000 ANTWERPEN, BELGIO  
FAKSE: +32 3 233 54 33  
RETE: [MONATO@FEL.ESPERANTO.BE](mailto:MONATO@FEL.ESPERANTO.BE)


**N**ur kvin respondoj (ĉiuj ĝustaj) venis responde al la du novembraj liter-taskoj. Ilin sendis Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen (Finlando), Dorota Burchardt (Pollando), Svetlana Konjašova (Ruslando), Birgitta Anevik (Svedio).

La loto donis libropremion al **Svetlana Konjašova**. Ni gratulas ŝin!

**La ĝustaj respondoj:** (1) Ivo Lapenna; (2) Irlando, Pakistano.

## La rado

Jen estas la rado, dividita je 30 radradioj. Ĉi-tien necesas centripete enskribi divenitajn vortojn, poste en la tria cirklo oni povas legi Zamenhofan proverbon.



1. Patkuko; 2. Sono, daŭre sonanta post ĉeso de ĝia kaŭzo; 3. Senfenestra ĉambro; 4. Alkohola trinkaĵo; 5. Ĥemia elemento numero 20; 6. Estro de fabriko aŭ laborejo; 7. Linio de la vizaĝo; 8. Japana mato; 9. Kapo; 10. Malhela blua diafana juvelŝtono; 11. Spirorgano de la fiŝoj; 12. Individua sonkoloro de voĉo; 13. Profundegaĵo; 14. Intesta doloro; 15. Trielektroda lampo; 16. Kampa restaĵo post la falĉado; 17. Diabolo; 18. Amaso da objektoj, metitaj unu sur alia; 19. Kunveno de pastroj; 20. Muzika intervalo; 21. Elektra fajrero; 22. Granda pelvo; 23. Malfacila kaj brua spirado; 24. Parto de ĉambro; 25. Frukto de greftita kaŝtano; 26. Mamulo, vivanta en Afriko kaj Azio; 27. Branĉo de la traĥeo; 28. La ĉefa noto de la gamo; 29. Monaĥejo; 30. Harmonio.

La solvo — divenita proverbo — venu al la redakcio rete aŭ poŝte antaŭ 15 feb 2008.

Kompilis **Jurij Kivajev**

Bildo de Maria Bajenova



## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

### Schwartz: Cenzuro eĉ postmorte

(konsultante “Laŭ mia... ridpunkto: 1957 de Raymond Schwartz”, <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr33/ridpunkto.html>, Cyrille Hurstel spertis jenan — franclingvan — respondon de servilo:) «La kategorio “Pornografio” estas blokita de la filtrilo».

### Ree la nano

Jes, ankaŭ mi elkore dankas vin, Renano por via granda sprono dum la jaroj al ni ĉiuj! (Ileana Schroeder, 13 aŭg 2007, <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/11407>)

### Seka kiel fiŝo

Faka kaj scienca gado: s-ro José Antonio Vergara (*Esperanto*, 2007, №9, pĝ. 170 — kolofono)

### Peciale trange kribite

Pritaj splitoj kaj preskeraroj (La titolo de tiu ĉi rubriko, *La Ondo de Esperanto*, 2007, №10, pĝ. 22)

### Kongresanoj dis-klingotaj?

La Universitato... selektita kiel la kongresejo por IJK... posedas 2 grandajn konferencajn salonojn (400 kaj 700 segoj); kaj pli ol 30 malgrandajn salonojn (30-60 segoj). (Unua bulteno de la 63-a IJK; rimarkis Ionel Oneț)

### Lernegi por instruon

Ĉu vi volus lernegi esperanton por Afrikan popolon? Mi trovas ke tio estos tre interesa de iri Afriko por instrui la infanojn. Kio vi pensas de tio? (“Joseph-Markus”, 3 jun 2007, <http://www.tejo.org/en/node/479>)

### Fidel: multobla esprimkapablo

La kuba gvidanto esprimas en siaj pripensoj ke estas konvene ilin esprimi antaŭ la referendumo okazonta en Venezuelo la venontan 2an de decembro. Li esprimas ke en siaj paroloj de la 13a de novembro li informis ke... (<http://www.cubanoticioj.ain.cu/2007/1119/reflexionesfidel.htm>)

### Reneto kaj kubetoj?

etejo de kubaj esperantistoj <...> Gratulojn, kubaj esperantistoj! (Renato Corsetti, 25 okt 2007, <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/11599>)

Plukis **István Ertl**

## Korektoj por la decembra Ondo

Detlev Blanke sendis du korektetojn por la artikolo de Malovec pri la Viena Kolokvo (pĝ. 3): La kolokvon iniciatis Herbert Mayer kaj Detlev Blanke; la aktojn eldonos UEA, sub la redakto de Herbert Mayer kaj Detlev Blanke.

István Ertl tute prave atentigis, ke *La Karavelo* estas eldonata en Portugalio, ne en Brazilo (pĝ. 2).

Sed plej bedaŭrinda estas informo de Gersi Alfredo Bays, ke, post lia informo pri la relanĉo de *Fonto* (pĝ. 11), evidentiĝis, ke tamen *Fonto* ne reaperos. Krome, en la sama paĝo 11 la emblemo de *Mondial* estis erare metita apud la respondo de *Libro-Mondo*.

*La Ondo* kaj nia redakcia preskoboldo deziras al vi

**Bonan novan jaron!**

## Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

**Argentino:** Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

**Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, "Nadejda" V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugallio:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Esperanto-urbo Herzberg** Ĉu iam la oficiala Esperanto-urbo, situanta meze en Germanio en bela mezmontara regiono Harz, aspektos pli-malpli laŭ la imaga pentraĵo de la 14-jara hungara knabino Dora Graf? (ICH)



**Krakovo** La unuan tagon de decembro en krakova kafejo *Kama* renkontiĝis pollandaj membroj de ILEI kaj gvidantoj de krakovaj esperantistaj organizaĵoj; la diskutadon de gravaj aferoj sekvis Andrea Vespero kun ludoj, proverbotradukado kaj, fine, komuna nokta bierumado. (Andrzej Sochacki / Adam Wilkus)



**Zagreb** En la 50a naskiĝfesto de la Studenta Esperanto-Klubo (vd. pĝ. 8) nungeneraciaj junaj klubanoj vestis sin laŭ la stilo de la kvindekaj jaroj kaj junuloj surhavis solenajn kostumojn kaj papilkravatojn. (Spomenka Štimec / Vladimir Kamenski)




J. R. R. Tolkien

## LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

Tolkien J.R.R. *La Kunularo de l' Ringo*.  
La unua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.  
464 paĝoj, 30 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

## LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien J.R.R. *La du turegoj*.  
La dua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.  
368 paĝoj, 27 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

## LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO

Tolkien J.R.R. *La reveno de la Reĝo*.  
La tria volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.  
328 paĝoj, 24 eŭroj.



Georges Simenon. *La flava hundo*.  
La kvara Esperanto-libro pri komisaro Maigret.  
120 paĝoj, 12 eŭroj.